

3/2019

Majo  
Julio

ISSN 0032-2431

# Pola Esperantisto

## Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ Du miraklaj kvartaloj
- ★ Pola E-Kongreso en Łochów
- ★ Aventuroj de rusa volontulo en Pollando

## **Pola Esperantisto**

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

## **Eldonanto**

Pola Esperanto-Asocio  
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a  
00-159 Warszawa  
<http://www.esperanto.pl>

## **Ĉefredaktoro**

Robert Kamiński, [rk-lodz@wp.pl](mailto:rk-lodz@wp.pl)

## **Kunlaboro**

T. Nemere, M. Tatara,  
A. Wilkus,

## **ABONOJ**

La abono por 2019 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 50 zlotoj  
eksterlando - 20 eŭroj  
Cifereca (pdf)  
Pollando - 25 zlotoj  
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002  
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu  
adreso estu sendata la revuo.

## **ATENTO**

Abonoj per eŭroj validas post  
aldono de bankaj kostoj.  
Polan Esperantiston eblas aboni per  
Konto de PEA en UEA: [peaa-v](mailto:peaa-v);  
Detaloj troviĝas ĉe:  
<https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>  
kaj <https://uea.org/alighoj/spagilo>

Presejo  
BŁĘKITNE STUDIO  
ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

## **Estraro de PEA**

Aleksander Zdechlik - prezidanto  
Teruo Matsumoto - vicprezidanto  
Robert Kamiński - sekretario  
Alina Mozer - kasisto  
Agnieszka Mozer - estrarano  
Marek Mazurkiewicz - estrarano

## **Ĉefdelegito de UEA**

Stanisław Mandrak:  
[stanislaw.mandrak@gmail.com](mailto:stanislaw.mandrak@gmail.com)

## **Peranto de UEA**

Jan Skonieczka: [jaskon@op.pl](mailto:jaskon@op.pl),

Pri la skribitaj artikoloj  
respondecas  
la aŭtoroj mem.  
Ricevitajn manuskriptojn  
oni ne resendas.  
La redakcio rezervas al si  
la rajton mallongigi  
kaj korekti la tekstojn.  
Represo kaj tradukoj nur  
kun indiko pri la fonto



**Pola Esperanto-Asocio**  
Polski Związek Esperantystów

Fronta kovrilpaĝo - Andrzej Zejdel el Bjalistoko

## Enhavo

Redaktoraj vortoj .....	2
<b>Estraro informas</b>	
<i>Robert Kamiński</i> , Nova Ĉefestraro de PEA .....	3
<b>Eventoj</b>	
<i>Paweł Dzienis, Adam Wikus</i> , Pola E-kongreso en Łochów .....	3
<i>Małgorzata Komarnicka</i> , La 7-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj .....	7
<i>Kjell Rehnström</i> , Esperanto ĉe Baltiko .....	8
<i>Teresa Pomorska</i> , Feriado en Łądek Zdrój .....	9
<i>Paweł Dzienis</i> , La ekspozicio „Promenado tra Bjalistoko” – mallonga raporto .....	11
<i>Ilona Koutny</i> , Instruista trejnado en la kunlaboro de la Interlingvistikaj Studoj de UAM, ILEI kaj Edukado.net .....	13
<b>Mojose</b>	
<i>www.pej.pl</i> , Nova Estraro de PEJ .....	14
<b>Raportoj, rakontoj</b>	
<i>Viktor Lagutin</i> , Laŭspure de Zamenhof, aŭ aventuroj de rusa volontulo en Pollando ..	15
<b>Pri kio ni aŭdas</b>	
<i>Robert Kamiński</i> , Trajno de satelitoj .....	18
<i>Spomenka Štimec</i> , Esperanto - nemateria kultura heredaĵo - en Kroatio !!! .....	19
<i>Peter Baláž</i> , E-o proponita kiel “Nemateria kultura heredaĵo” ankaŭ en Slovakio	20
<i>Ret-Info</i> , 250+ fakaj Esperanto-vortaroj en la reto! .....	21
<b>Vizitindaj lokoj</b>	
<i>Ewa Caban</i> , Du miraklaj kvartaloj .....	22
<b>Homoj</b>	
<i>Andrzej Tichomirow</i> , Zamenhof en Grodno .....	28
<b>Lingvosciencia angulo</b>	
<i>Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko</i> , „La” ĉe propraj nomoj (tria parto) .....	30
<b>Literaturaĵoj</b>	
<i>Roman Dobrzyński</i> , Verda simio,.....	32
<i>Roman Dobrzyński</i> , Retoriko .....	35
<b>Saĝulaj pensoj</b>	
<i>Konrad Andrzejuk</i> , Moderna Babelturo – (Mult)lingva problemo hodiaŭ .....	38
<b>Leterkesto</b>	
<i>BES</i> , Literatura konkurso en Bjalistoko .....	39
<i>Ilona Koutny</i> , Kunlaboro kun ĉina universitato .....	39
<b>Kalendaro</b>	39
<b>Oni eldonis</b>	
„Avo kiu estas nepo” .....	43
<b>El fotogalerio de Andrzej Sochacki</b>	
<i>Andrzej Sochacki</i> , 72-a Universala Kongreso de Esperanto, 1987 j. ....	44

Estimataj legantoj!

Partoprenante en diversaj Esperanto-aranĝoj, ni estas jam meze de la ĉijara somero. Okazis jam, la plej grava por PEA, Pola Esperanto Kongreso, ĉifoje en la malmulte konata urbeto Łochów. Tiu neatendite bela loko helpis bone ripozi, turismi kaj ankaŭ labori. Dum la Kongreso okazis la Ĝenerala Kunsido de Pola Esperanto Asocio, dum kiu oni elektis novan ĉefestraron kaj revizian komisionon. Antaŭ la nova estraro estas novaj taskoj kaj multe da laboro. En nia movado estas kelkaj, de langa tempo kreskantaj, problemoj. Laŭ mi, la plej grava estas manko de profesiaj E-instruistoj. Esperantistoj volus vidi Esperanton, instruata en lernejoj. Bela ideo, sed preskaŭ nerealigebla. Lernejoj atendas instruistojn kun oficiale konfirmita lingva kaj instrua kapablo. Inter ni estas malmultaj instruistoj, kiuj havas atestilon de KER-ekzameno kaj pedagogian edukon. Ricevi atestilon de KER-ekzameno estas sufiĉe facile. Dum multaj aranĝoj okazas KER ekzaminado. Fini pedagogian kurson en Esperanto estas malpli facile. Adam Mickiewicz Universitato en Poznań organizas instruistan trejnadon, kiu helpas fariĝi “atestita instruisto de Esperanto”. Bedaŭrinde, malmultaj poloj partoprenas en la instruista trejnado. Kio malhelpas? Prezo de la kurso, manko de tempo, distanco al Poznań? Ĉijare komenciĝos, verŝajne jam la lasta, instruista trejnado en Poznań. Mi kore rekomendas partoprenon en la trejnado. Pri tiu ebleco, bonvolu legi en la anonco de Ilona Koutny.

Alia problemo de la pola Esperantujo estas kunlaboro inter esperantistoj. Samideanoj ne kunlaoboras kaj komencas konkurenci inter si. En la batalo inter kunlaboro kaj ambicio foje venkas ambicio. Mi bedaŭras, ke ne ĉiam ni povas ion fari kune. Kie malaperas nia interna ideo? En ofte ŝanĝiĝanta mondo, nur komuna laboro donas forton kaj energion. Ni estu respondecaj pri nia Esperanto movado. En la tria numero de Pola Esperantisto aperas kelkaj interesaj tekstoj. Mi rekomenas du „bjalistokajn” artikolojn: kortuŝan tekston de Viktor Lagutin, la ruso kiu laboris kiel volontulo en Bjalistoka Esperanto Societo, kaj ankaŭ tiun de Konrad Andrzejuk. Vi pensu ankaŭ pri la alproksimiĝanta, sekva literatura konkurso en Bjalistoko.

Post la fortiga, somera ripozo, ni vekigu kaj pliintensigu nian laboron! Ankoraŭfoje mi petas: ne forgesu raporti al Pola Esperantisto pri organizataj kaj partoprenataj de vi Esperanto aranĝoj. Ni scias, ke okazas multe pli ol ni priskribas, sed sen la kunlaboro kun diverslokaj samideanoj ni ne scipovas raporti pri ĉio.

*Robert Kamiński*

## Estraro informas

*Robert Kamiński*

### Nova Ĉefestraro de PEA

Ĝenerala Kunsido de PEA-membroj, dum la 38-a Pola Esperanto-Kongreso en Łochów, elektis novan estraron de Pola Esperanto-Asocio:

Robert Kamiński – prezidanto

Agnieszka Mozer - vicprezidantino

Zofia Śmistek - sekretariino

Alina Mozer – kasistino

Marek Mazurkiewicz - membro

Revizia Komisiono: Halina Fűchsel - prezidantino, Świętosław Fortuna - vicprezidanto, Zbigniew Kowalski - membro.

## Eventoj

*Paweł Dzienis, Adam Wilkus*

### Pola E-kongreso en Łochów

Dum la sunplenaj tagoj de la 31-a de majo ĝis la 2-a de junio 2019 okazis 38-a Pola Esperanto Kongreso. Partoprenis ĝin kelkdek esperantistoj el Pollando, Germanio, Nederlando, kaj Rusio. Ĉi-foje oni kongresis en Łochów, la urbo, kiu ĵus festas sian 50-an jubileon, sed kiel vilaĝo egzistas jam ekde la 13-a jarcento.

Kongresejo troviĝis en la renovigita stacidomo de Łochów, ĉe la fervoja linio Varsovio – Bjalistoko. La blankan, masonitan stacidomon oni konstruis dum la kreado de la Varsovia-Petersburga Fervojo, en la dua duono de la 19-a jarcento. Sur la unua etaĝo de lakonstruaĵo troviĝas granda salono, kiu dum tri tagoj servis por kongresanoj. Tra fenestroj oni povis vidi preterpasantaj trajnojn. La stacidoman frontmuron dekoris la Esperanta flago, dank' al tio ĉiuj sciis, ke tie renkontiĝas esperantistoj.

Vendrede, post la solena malfermo, kiun ĉeestis la urbestro Robert Mirosław Gołaszewski, oni faris komunan foton antaŭ la kongresejo. Sekve, okazis prelegoj pri beleco kaj historio de la kongresurbo kaj prelego pri Lidia Zamenhof.

Kongresanoj tranoktis en la hotelo „Pałac”, en la renesanca palaca komplekso apud rivero Liwiec, ĉirkaŭita de la bela parko. Sur la palaca barilo organizantoj de la kongreso prezentis ekzpozicion pri Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto.

Sabate, kongresanoj ekskursis al la vilaĝo Treblinka kaj la urbeto Brok. Dum la 2-a mondmilito en Treblinka ekzistis nazia koncentrejo kaj ekstermejo, kie mortis interalie Lidia, Zofia kaj Ida Zamenhof.

Esperantisto Wojciech Laskowski, instruisto pri historio en la loka mezlernejo, rakontis pri tiu ĉi loko. La kongresanoj honorigis viktimojn per la minuta silento. Nuntempe troviĝas tie la granda omaĝmonumento kun multaj ĉirkaŭantaj ĝin ŝtonoj, signantaj la devenlokojn de la viktimoj. Unu el la ŝtonoj estas dediĉita al la kuracisto Janusz Korczak kaj al infanoj el la varsovia juda domo de orfoj. En la memorlibro de la loka, malgranda muzeo, kongresanoj esperantlingve enskribis kelkajn vortojn, menciante la familion de Zamenhof, pereinta en Treblinka.



Revenante al kongresejo la ekskursantoj vizitis la malnovan urbeton Brok, apud la rivero Bug. Komence ili vizitis historian urbocentron, kie situas urbodomo, la papa kverko kaj la brika preĝejo al la Sankta Apostolo Andreo kaj poste venis ili al la ripozejo „Binduga”, kies posedanto regalis

ĉiujn per bongusta vino. Promenante ĉe bordo de la rivero oni povis admiri la belan mazovian panoramon kaj du lignajn ventmuelejojn.

Kelkaj kongresanoj, kiuj ne ekskursis al Treblinka, biciklis al la proksima naturrezervejo "Wilcze Błota" (Lupaj Kotoj) kie, en la bele odoranta arbaro kaj herbejoj, troviĝas multaj birdoj. En la farmbieno apud palaco, la ekskursantoj vizitis la atelieron de la skulptisto Krzysztof Grodzicki. La artisto, kreas eksterordinarajn skulptaĵojn el lingno, en formoj de fabelaj herooj, bestoj kaj homoj.



Inter la plej interesaj programeroj de la kongreso estis muzikaj koncertoj. Dum la vendreda vespero, la kongresanoj ekzercis kantadon antaŭ la koncerto de „Kajto”. La artistoj projekciis kantotekstojn sur ekrano, dank' al kio estis facile kanti komune.

Sabate vespere, la 1-an de junio, en la stacidoma salono okazis koncerto de la nederlanda duopo „Kajto”, kiun aŭskultis ankaŭ la urbestro kaj kelkaj loĝantoj de Łochów.

Dimanĉe matene, la kongresanoj kaj loĝantoj ĉeestis, parte esperantlingvan, sanktan meson en la apudpalaca, ligna preĝejo.

Poste okazis la Ĝenerala Kunveno de Pola Esperanto Asocio, dum kiu oni pridiskutis multajn aferojn de la asocio kaj elektis novan PEA-estraron (Robert Kamiński, Agnieszka Mozer, Zofia Śmistek, Alina Mozer, Marek Mazurkiewicz) kaj revizian komisionon (Halina Füchsel, Świętosław Fortuna, Zbigniew Kowalski). La ĝisnuna estraro prezentis raportojn pri sia agado kaj sciigis pri taskoj finitaj kaj tiuj, kiujn oni devas daŭrigi. Oni postulis interalie plibonigi

organizajn aferojn, aprezi kontribuon por nia lingvo ankaŭ de ne-esperantistoj, kaj plifortigi kunlaboron inter esperantistaj organizaĵoj en Pollando.

Bedaŭrinde, dum la kongreso kelkaj programeroj estis prezentitaj nur en la pola lingvo kaj eksterlandaj gastoj ne tute komprenis pri kio temis. Tion oni nepre devas plibonigi estonte. Ĉiujn programerojn dum E-kongreso oni devas prezenti en Esperanto aŭ almenaŭ kun la traduko en la internacian lingvon. Inter tranoktejo kaj kongresejo estis kelkkilometroj longa distanco. Sen la publika transporto, multaj kongresonoj devis trairi tiun vojon per piede, kio ne ĉiam estis facila.



La samideano Johano Pachter el Germanio informis la kongresanojn pri la komuna pola-germana E-kongreso, planata por la venonta jaro, kiu okazos pentekoste, dum la lasta semajnfino de majo 2020, ĉe la germana-pola landlimo, samtempe en la najbaraj urboj: Frankfurt (ĉe Odro) kaj Słubice (<https://esperanto.berlin/gek2020/>). Li ankaŭ menciis pri kunlaboro de esperantistoj kun polaj lernejoj en Żłotoryja.

Por kongresanoj, kiuj ne partoprenis en la kunveno, estis organizita promeno tra la urbo kun la loka gvidanto Wojciech. Oni promenis apud la palaco, tra la ĉirkaŭanta ĝin parko, preter domoj de la bienego, pri kies historio li rakontis. La grupo promenis ĝis la moderna lernejo, kie li laboras. Oni promenis ankaŭ ĉe la bordo de la rivero Liwiec kaj vizitis malgrandan bestejon.

Dimanĉe posttagmeze, parto de la kongresanoj ĝuis prezentadon de la junulara dancgrupo, en loka liceo, organizita okaze de la urba jubileo. Direktoro de la liceo, prezentante invitatajn gastojn, menciis ankaŭ partoprenantojn de 38-a Pola Esperanto-Kongreso.

Okaze de la kongreso, la Pola RetRadio en Esperanto <http://pola-retradio.org/> preparis elsendon, dediĉitan al historio de la kongresa loko, kadre de la serio "Koninda Pollando", Tiun felietonon oni povas aŭskulti en la 858-a elsendo el la 1-a de junio 2019.

Ni esperas, ke Esperanto, helpe de lokaj samideanoj, gastigos en Łochów por ĉiam.



## La 7-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj

La 7- a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj okazis sukcese dum la 25-26-a de majo en Wrocław, la ĉefurbo de la pola regiono Malsupra Silezio, sub patronado de la Universala Esperanto-Asocio, Prezidanto de la urbo Jacek Sutryk, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, Eurokka, Juna Amiko, Interreta Radio Kson, Mila Van Der Horst Kolińska – fama esperantistino kaj Bohdan Aniszczyk – la prezidanto de la Komisiono pri Edukado kaj Junularo.

La organizanto, la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, sukcesis ricevi monsubtenon de la Kulturfako de Urba Oficejo en Wrocław [www.wroclaw.pl](http://www.wroclaw.pl). La aranĝo mem okazis en la impona kaj prestiĝa loko, en Filharmonio de Witold Lutosławski.

La 25-an de majo okazis provprezentoj de la partoprenantoj, kiujn gvidis Halina Kuropatnicka-Salamon, helpe de Lucyna Kowalewska. Kvar ĵurianoj havis pezan taskon elekti gajnintojn en du kategorioj ( 1. koruso aŭ ensemblo, 2. solisto) kaj en konvena aĝkategorio (infan-junulara, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj). Ĉiu partoprenanto prezentis unu nacilingvan kanton kaj unu en Esperanto, sed dum la Koncerto de la Premiitoj, ĉiu gajninto prezentis nur Esperantan kanton. Ĉi-jare partoprenis en la festivalo multe pli da pliaĝulaj korusoj kaj solistoj, sed malpli infanoj kaj junuloj ol en antaŭaj jaroj. La ĵurion kreis specialistoj – esperantistoj: Małgosia Komarnicka el Pollando, Jean-Marc Leclercq el Francio, UEA-estrarano Stefan MacGill el Nov-Zelando kaj muzikistoj: jam menciita Jean-Marc Leclercq kaj Jakub Tracz el Pollando.

La sekvan tagon, la 26-an de majo, okazis Koncerto de la Premiitoj, la krona evento de la festivalo. La publiko estis salutita de reprezentanto de la vrocłava registaro. Tiun koncerton gvidis Małgosia Komarnicka, la iniciatintino de la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kaj JoMo - E-kantisto. Post mallonga prezento de la festivala regularo, la publiko kun plezuro aŭskultis la premiitajn kantojn, kaj fine JoMo sprite interagis kun la publiko kaj tiel dancige kantis, ke la publiko, ĝuante la belajn kantojn en Esperanto, dancis sur la scenejo kaj apud ĝi.

Dum tiuj du festivalaj tagoj estis plurfoje menciita la subteno de UEA (<https://uea.org/>) dank' al kiu estis impone presita kaj bindita *Festivala Kajero nr 1*, kiu entenas la historion de la festivalo kaj foton kun biografio

noto de la partoprenantoj de la 6-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kiuj ĝustatempe sendis ilin.

Ĉi-jare la festivalo abundis je multaj belaj premioj kaj estis enkondukita la sekva: ARKONES-Premio Ĉiu premiito ricevis belajn atestilon, pokalon, *Festivalan Kajeron* kaj multajn diversajn donacojn.

La 7-an Eŭropan Festivalon de Esperantaj Kantoj akompanis unike bela kaj rava etoso. La publiko entuziasmege reagis, ĝoje aplaudis, vigle mangestis, koruskriis kaj dancegadis sur la podio.

La organizanto - la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado jam invitas vin partopreni en venonta, jam la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj.



*Kjell Rehnström, Svedio*

## Esperanto ĉe Baltiko

La Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno okazis ĉi-jare de la 7-a ĝis la 18-a de junio. Partoprenis en ĝi esperantoparolantoj el Pollando, Belorusio, Germanio, Nederlando kaj Svedio.

Dum la renkontiĝo estis eblecoj partopreni en konversacia kaj perfektiga kursoj, kiujn merite gvidis Teresa Nemere el Toruń. Rezulte de la kursokupoj, la partoprenantoj prezentis, en la formo de teatraĵo la legendon pri deveno, de la famaj spickukoj de Toruń. Por kiu la aktoroj mem kreis la kostumojn.

Tre ŝatata programero estis la komuna kantado. Georgo (gitare) kaj Halinka (akordione) zorgis pri muziko kaj ni ne nur kune kantis diversajn, plej ofte polajn, kantojn en la pola kaj en Esperanto, sed ni ankaŭ aŭskultis

kantadon de unuopaj ĉeestantoj. Speciale ni ŝatis la belan kantadon de ĉeestantaj belorusinoj.

Teresa Pomorska kaj Halinka Rózanek iniciatis manifestacion pri Esperanto surstrate, apud la monumento omaĝe al maristoj. Ili ankaŭ kolektis grupon, kiu dum la dimanĉa sankta meso kantis du esperantlingvajn kantojn en la loka preĝejo.



Mi ŝatas Mielnon: Baltiko, belega strando kaj pentrindaj stratoj. La fakto, ke malmultaj partoprenantoj ne parolis Esperanton, estis bona por tiuj eksterlandaj partoprenantoj, kiuj volis ekzerci la polan lingvon, sed ni ja venis Mielnon por uzi kaj espereble plibonigi nian Esperanton! Mi opinias, ke oni devas konsideri tion. Temas pri la grava kultura heredaĵo de Pollando.

---

*Teresa Pomorska*

## Feriado en Łądek Zdrój

Post unu monato, en Łądek Zdrój, okazos sekva - jam la 52-a Internacia Esperantista Feriado, organizata de Silezia Esperanto Asocio. Ne estas facile rakonti pri estonteco, do eble mi iom raportos pri la pasintjara evento, kiu daŭris 9 tagojn. La programo estis vere abunda. Ĉiutage, antaŭtagmeze, okazis diversnivelaĵ kursoj, kiujn gvidis la spertaj

instruistinoj: Teresa Nemere, Betty Chatterjee kaj Halina Kuropatnicka-Salamon. Matenojn ni komencis per specialaj korpekzercoj por ĉiuj korpoptoj, kiujn lerte gvidis Barbara Poterucha el Bruselo, kaj la tagojn ni finis per rondaj dancoj, sur la teraso de nia domo, kiujn ĉarme gvidis Danusia Leyk kaj admiris apudloĝantaj najbaroj.



Dum la feriado okazis du esperantlingvaj koncertoj en la belega, antikva, mineralakva trinkejo „Wojciech”. Ambaŭ plenumantoj: Carsten Schnathorst – juna pianisto kun belega voĉo el Hamburg (Kaŝi) kaj Wojtek Ławnikowicz - blinda gitaristo el Wrocw ricevis grandan aplaŭdon de laaŭskultantoj, kiuj poste volonte akceptis nian inviton por aliaj E-programeroj: komuna kantado en la kuracurba parko, esperantlingva sankta meso kaj eĉ por niaj vesperaj renkontiĝoj. La vorto Esperanto bone enskribiĝis en memoron de la homoj, kiuj tiam pasigis tempon en Łądek.



Ni volas daŭrigi tiun sperton ankaŭ dum la ĉijara feriado, kiu okazos en la tagoj 30.08 - 7.09.2019. Tiuj aktivaĵoj, kiujn mi resume priskribis, estas kutimo dum multaj jaroj kaj ĝenerale ili plaĉas al la partoprenantoj. La tagprogramo, dividita per tri manĝoj: matena gimnastiko,

antaŭtagmezaj lingvaj lecionoj, posttagmezaj komunaj promenoj kaj vespera programo: kantado dancado ktp. ne lasas tro multe da tempo por „resti en la ĉambro kaj kuŝi sur kanapo”, sed vere motivigas al la komuna agado. Mi ankoraŭ ne scias, ĉu ĉiuj menciitaj personoj, kiuj vere riĉigis nian pasintan restadon gvidante diversajn okupojn, venos ĉijare, sed mi povas garantii, ke denove estos interese kaj amuze Okazos lecionoj, multe da kantado kun akompano de muzik instrumentoj (gitaro kaj akordiono), dancado, komunaj promenoj en la belega, verda kuracurbo, kie oni povas manĝi bongustajn glaciaĵojn kaj trinki bieron.



Okazos ankaŭ elpaŝo de la fama en Esperantujo, multlingva kantisto Jean-Marc Leqlerc (Jomo), en la koncerta urba konko (3.09) kaj tuttaga ekskurso al Ĉehio (ankoraŭ ne decidite kien precize).

Se Vi ankoraŭ ne decidis, kien iri por iom enspiri esperantistan etoson, pripensu eblecon veni al Łądek Zdrój.

Por iom proksimigi etoson de la feriado, jen kelkaj fotoj.

---

*Paweł Dzienis*

## La ekspozicio „Promenado tra Bjalistoko” – mallonga raporto

Vespere, la 16-an de majo 2019, en la Centro de Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko, okazis solena inaŭguro de la interesa ekspozicio kun desegnaĵoj de Władysław Pietruk. La rigardantoj povas rigardi la naskiĝurbon de la kreinto de Esperanto sur dudek unu desegnaĵoj. La aŭtoro de la verkoj – Władysław Pietruk estas fama kaj premiita artisto.

Kiel li mem diris, li desegnas de pli ol 45 jaroj. Li estas aŭtoro de pli ol sep mil desegnaĵoj kaj de multaj albumoj, afiŝoj, ilustraĵoj, projektoj, librokovriloj kaj ekslibrisoj. Kiel ni povas legi en la retpaĝo

<http://www.centrumzamenhofa.pl/eo/art,755,promenado-tra-bjalistoko-en-desegnaoj-de-wladyslaw-pietruk>, organizantoj de la ekspozicio klarigis elekton de la verkoj tiamaniere: *“El la grandega aro da desegnaĵoj, devenantaj el la riĉa kolekto de la artisto, ni faris elekton laŭ difinita, subjektiva maniero, ĉar precipe gravis por ni montri la etoson de nia urbo kaj ĝian multkulturecon”.*

Esperanto, uzita en la ekspozicio, ludas gravan rolon. Unue, ĉiuj desegnaĵoj havas trilingvajn subskribojn - pole, esperantlingve kaj angle. La ekspozicio prezentas, inter aliaj, desegnaĵojn pri la Centro Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko (desegnaĵo numero 1), monumento al Ludoviko Zamenhof (desegnaĵo numero 19), Bjalistoka Urbodomo ( numero 20) kaj la 6-a liceo en Bjalistoko, iama reala gimnazio, en kiu dr-o Esperanto lernis (numero 21). Tiamaniere kelkaj bjalistokaj ZEOj estis eternigitaj en la arta formo. Ni havas novan rigardon al ili. Due, la organizantoj preparis polan kaj esperantlingvan versiojn de informiloj pri la aŭtoro kaj ekspozicio. Esperantlingvaj subskriboj estas ege utilaj. Mi aŭdis, kiel iu rigardanto legis la subskribon en Esperanto kaj klarigis al sia amikino, kial oni uzas vortojn “pordego” kaj “kolumnaro”. Li klarigis, kiam oni povas uzi “-eg” kaj “-aro”.



Interesa estas ankaŭ tio, ke kelkajn desegnaĵojn de Władysław Pietruk organizantoj pligrandigis kaj prezentis sur diversaj materialoj, kiel ekzemple sur vitro. Nur estas bedaŭrinde, ke mankas desegnaĵo de la nova monumento al la juna L. Zamenhof. Ĝi estas nova ZEO en Bjalistoko. La monumento estis realigita kadre de la Civitana Buĝeto. Malkovro de la statuo okazis la 14-an

de aprilo 2019, dum la solenaĵoj, organizitaj okaze de la 102-a datreveno de morto de Zamenhof. Ni devas esperi, ke la artisto baldaŭ preparos ankaŭ desegnaĵon kun la nova monumento de sur la bjalistoka urboplaco. Ni atendas tion.

Sumigante la ekspozicion „Promenado tra Bjalistoko”, ni substreku, ke kadre de la artista ekspozicio ni povas rekoni kelkajn bjalistokajn ZEOjn. Portempa ekspozicio estas vizitebla ĝis la 7-a de julio 2019. Mi pensas, ke ĝi estas interesa kaj vizidinda, ne nur por bjalistokanoj, sed por ĉiuj, speciale por esperantistoj.

---

*Ilona Koutny*

## Instruista Trejnado en la kunlaboro de la Interlingvistikaj Studoj de UAM, ILEI kaj Edukado.net

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznań, Pollando) kaj ILEI, denove kune, organizas unujaran instruistan trejnadon kun la kontribuo de Edukado.net, kiu disponigas la bazajn konojn, necesajn por instruado de Esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko. La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka, intensa, semajna sesio (la unua okazos 14-20.09.2019, la dua 01-07.02.2020) kaj intertempan hejman laboradon, retajn taskojn kaj konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj, fine, pretigon de laboraĵo pri metodika temo, kies prezento kun la fina ekzameno okazos en septembro 2020.

Aliĝantoj ricevos ILEI-diplomon pri la instruista trejnado. La kondiĉoj por aliĝo: bona lingvoscio (min. B2, atestilo pri Esperanto-ekzameno estas bonvena) kaj la baza kono de Esperanta kulturo, krome necesas finita, mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno).



Partoprenkotizo: A-landoj: 300 EUR, B-landoj 130 EUR por unu semestro. Informo kaj aliĝo: [interlin@amu.edu.pl](mailto:interlin@amu.edu.pl) aŭ [ikoutny@amu.edu.pl](mailto:ikoutny@amu.edu.pl).

En la Programo: Lingvopedagogio (Katalin Kováts, Ilona Koutny, Zsófia Kóródy): Bazaj faktoroj de lingva pedagogio (instrumetodoj, instrupocezo, evoluigo de kapabloj, taksado, lingva interfero, ktp.), Esperanta metodiko (instruado de elparolo, gramatiko, vortoprovizo kaj kulturo, planado de lecionoj kaj kursoj, ktp.), Instruhelpiloj (de instruista kofro tra eldonaĵoj, filmoj ĝis retkursoj), Esperanta kulturo (Tomasz Chmielik, István Ertl, Ilona Koutny): Tiklaj punktoj de E-gramatiko, Ĉefaj periodoj kaj verkistoj de E-literaturo. La plej gravaj eventoj de la historio de Esperanta lingva trejnado (per testoj), Donaco por la partoprenantoj: partopreno en la aktualaj kursoj de la Interlingvistikaj Studoj.

## Mojose

[www.pej.pl](http://www.pej.pl)

### Nova Estraro de PEJ

La 1-an de junio, dum la PEJ-Kongreso en Varsovio, estis elektita, por la oficperiodo 2019-2020, la nova estraro de Pola Esperanto-Junularo.

- Romualda Jeziorowska – prezidantino
- Paweł Wójtowicz – vicprezidanto
- Tobiasz Kubisiowski – sekretario
- Piotr Hołda – kasisto

Piotr kaj Tobiasz restas en la samaj pozicioj kiel antaŭe. Romualda, la nuna prezidantino, antaŭe okupis postenon de vicprezidantino. Paweł Wójtowicz eniris la estraron por la unua fojo, kaj Tomasz Szymula forlasis la estraron, en la lasta oficperiodo de la prezidanto - dankon al li pro kunlaboro!





Viktor Lagutin

### Laŭspure de Zamenhof, aŭ aventuroj de rusa volontulo en Pollando

– Ĉu inter vi estas esperantistoj? – demandis nia instruistino de lingvistiko. Dudek paroj de nekomprenantaj okuloj rigardis ŝin. Post nelonga eksplikado pri la internacia lingvo, ĉiuj en la grupo ekoscendis. Ĉiuj krom mi – tiam la 20-jara studento de Pedagogia Universitato, en la fororienta rusia urbo Ĥabarovsko. Post kelkaj tagoj, la instruistino donacis al mi malnovan, sovetian lernolibron de Esperanto. Ŝia patro planis forĵeti ĝin kun aliaj rubaĵoj, sed ŝi lastmomente haltigis lin. ‘Vi estas feliĉa’, – diris ŝi al mi, aludante, ke tio estis mia destino. Tiel komenciĝis mia verda vojaĝo, venigonta min al Bjalistoko kelkajn jarojn poste.



Iuvespere, trarigardante kiel kutime informajn torentojn en la sociaj retejoj, mi ekvidis la interesan anoncon: oni serĉis Esperanto-parolantajn gejunulojn, por volontula servo en Pollando. “Oni ja ne elektos iun el tia malproksimego!” – estis mia unua penso, post malgaja kontrolo de la distanco inter Ĥabarovsko kaj Varsovio. Pro la pura interesiĝo, mi aliĝis al la programo kaj tuj forgesis pri la afero.

Ricevita, post kelkaj tagoj, oficiala invitilo en la pola lingvo, estis por mi vera ŝoko. Tamen, tempon por miro mi ne havis. Vizo, flugbiletoj, pakado, antaŭvojaĝaj renkontiĝoj kun amikoj... Komprenigi ĉiujn detalojn de la projekto al miaj surprizitaj geparencoj mi ne povis, ĉar simple mi mem sciis preskaŭ nenion.

Kvankam, dekomence mi certis, ke mi estas survoje al nekredebla aventuro.

Post la 24-hora flugo, kiu pro ekscitiĝo ŝajnis al mi momento, mi alvenis al la naskiĝurbo de Zamenhof, por volontuli en Bjalistoka

Esperanto-Societo, kadre de la projekto (Erasmus+). Mia volontula servo daŭris de novembro 2018 ĝis junio 2019. Dum tiuj ok monatoj, Bjalistoko, la lokaj esperantistoj kaj aliaj bjalistokanoj iĝis mia dua familio, al kiu mi estas ege dankema.

Miaj devoj rilatis al ĉiuj Esperanto-aktivecoj kaj eventoj, okazintaj en la urbo kaj organizataj kun mia helpo. Unu el la plej grandaj estis Zamenhof-tagoj en decembro, kunigantaj en Bjalistoko multajn esperantistojn el Pollando kaj aliaj landoj. Estis por mi ankaŭ granda honoro ĉeesti la malkovron de la nova monumento al juna Zamenhof, dum solenaĵoj okaze de la naskiĝtago de D-ro Esperanto. Fine de majo, mi partoprenis polan Esperanto-kongreson en la pitoreska Łochów.



Viktor kun Andrzej Zejdel

Granda parto de mia laboro konsistis el instruado de Esperanto. Mi asistis la instruistojn; ili gvidis lecionojn en tri grupoj de diversaĝaj studentoj, kiuj ricevis diplomojn fine de la kurso. Mi ankaŭ organizis Esperanto-kurson por la laborantoj de Zamenhof Centro kaj ĉiusemajne kunlaboris kun Esperanto-Libraro (filio de Podlaĥia libraro). Alia mia interesa devo estis organizado de la bjalistoka lingvokafejo, kie oni povas senpage praktiki iujn ajn lingvojn. Kadre de la projekto, mi kelkfoje faris prezentaĵojn pri mia regiono en la lernejoj de Bjalistoko kaj en la apudaj

vilaĝoj. La infanoj atente aŭskultis pri tajga naturo, siberiaj tigroj, matenmanĝoj kun kaviaro kaj vivo ĉe la landlimo de la malproksima Ĉinio.

La unuaj tagoj en la urbo plenigis mian koron per diversaj emocioj. Ĉio estis multkolora sonĝo: mi parolis Esperanton kun gesamideanoj surstrate, kie iam iradis la Majstro mem. Homoj turnis sin al ni ekaŭdante la belsonan lingvon. Ili demandis, ĉu estas la hispana aŭ la itala; mi ridetis kaj informis ilin pri la verda lingvo, inventita de ilia fama samurbano. Mi trovis tiun metodon konatiĝi tre amuza. Interalie, malgraŭ la hodiaŭa propagando, kiu freneze penas malamikigi la polojn kaj la rusojn, mi plezure atestis kontraŭan situacion. Dank' al kontaktoj kun lokuloj kaj oftaj vizitoj ĉe polaj familioj, mi povis profundigi miajn konojn pri la originala pola kulturo. Krome, la simileco inter niaj pensmanieroj kaj lingvoj ebligis al mi eviti kulturalan ŝokon kaj senti min komforte, ekde la komenco de mia restado.

Estinte en Eŭropo, kiun mi ĉiam revis viziti, mi uzis ĉiun ŝancon por vojaĝi. Krom diversaj vilaĝoj en Podlaĥio kaj ĉefaj turistaj direktoj en Pollando, mi veturis al kelkaj apudaj landoj kiel Litovio, Belorusio, Aŭstrio, Ĉeĥio kaj Hungario. Neniam mi forgesos bongustajn manĝaĵojn, trinkaĵojn, drinkaĵojn kaj sendormajn noktojn en la kompanio de novaj amikoj. Multaj el ili estis – same kiel mi – eksterlandanoj, kiujn la destino sendis rekte en miajn brakumojn.

Post kortuŝaj adiaŭaj renkontiĝoj fine de junio, mi rehejmiĝis. Certe, mi estas en kontakto kun la homoj, kiujn mi ekkonis en Pollando. Mi daŭre uzas la internacian lingvon – ĉefe, en la interreto. Bedaŭrinde, hodiaŭ esperantistata aktiveco en Rusia Fororiento estas prezentita nur de kelkaj homoj, loĝantaj en diversaj setlejoj. La unuaj esperantistoj aperis en la regiono jam fine de la 19-a jarcento. Ĝis la fino de la 1980-aj jaroj funkciis Esperanto-kluboj en kelkaj urboj. Hodiaŭ Vladivostoko ankoraŭ povas fanfaroni pri la klubejo, kiu nomiĝas „Pacifiko”.

Dum la longega flugo hejmen, mi sidis en la aviadilo, pensante pri Bjalistoko kaj la grava loko, kiun ĝi okupas en koroj de ĉiuj esperantistoj. Tamen, por mi ekde nun, la urbo estos eĉ io pli multe ol hejmo de Zamenhof. La volontula vivperiodo ĉiam restos unika paĝo en la libro de miaj memoroj.


Promenante sur bjalistokaj stratoj, mi sekvis la spurojn de Zamenhof kaj ofte imagis la multkulturalan etoson de la loko antaŭ jaroj. Mi fantazie akompanis la junan Ludovikon, promenante al lia lernejo tra la stratoj, kie la homoj parolis pole, ruse, jide... Tiuj lingvoj intermiksiĝis en mia kapo kaj subite ŝajnis al mi, ke la stratvendistoj, fabriklaborantoj kaj simplaj preterpasantoj komencis paroli unu lingvon, tute komprenante unu la alian.

Estas simbolo, ke kelkajn tagojn post mia reveno el Pollando mi hazarde renkontis la instruistinon, dank' al kiu mi esperantistiĝis. Mi dankis ŝin kaj diris, ke ŝi estis prava. „Pri kio do?” – surpriziĝis ŝi. „Esperanto estas mia destino”, – mi respondis, ridetante.

## Pri kio ni aŭdas

Robert Kamiński

### Trajno de satelitoj



La 24-an de majo, sur la nokta ĉielo, aperis moviĝanta rapide ŝnuro de brilantaj punktoj, kiuj mirigis eĉ astronomojn. Ĝi aperis neatendite, je la 22:55 h. Evidentiĝis, ke tio estas la nova, eksterordinara projekto SpaceX de Elon Musk, kiu ĉi-foje sendas milojn da satelitoj, kiuj cirkulos ĉirkaŭ la Tero kaj provizos interreton sur la tutan planedon.

Elon Musk, devenanta de Sud-Afriko entreprenisto kaj filantropo, estas konata pro multaj novigaj ideoj. La plej nova projekto *Starlink* estas tre praktika kaj alirebla por ĉiuj.

Satelitoj Starlink en la raketo Falcon 9

Ĉu ĉi tio estas freneza ideo? Modernaj socio kaj industrio ne povas kreski, sen aliro al interreto. La konjekto kun telekomunikaj retoj ne ĉiam funkcias sufiĉe bone. Foje, eĉ meze de granda urbo, ni povas esti en “reta truo”, sen interreta aliro. Eĉ en Pollando, en pli malgrandaj urboj kaj vilaĝoj, estas problemoj kun interreto. La tutmonda reto de satelitoj, ĉirkaŭantaj nian planedon, provizos aliron al la interreto ĉie: super oceanoj, en montoj, en kamparo. - Danke al la satelitoj Starlink, ni povos konektiĝi en la afrika savano. Ĉi tio povas esti tre grava por kriz-sistemoj kaj ĉi tio estas unu el multaj avantaĝoj kaj aplikoj de la projekto

Starlink ŝajnas esti malfacila tasko, sed ĝia efektivigo estas pli malmultekosta nun ol antaŭ multaj jaroj, ĝuste danke al reuzeblaj raketoj. Unu el ili portis la unuan aron de satelitoj por la orbito de la Tero.

Ĉi tio estas nur komenco de la projekto Starlink. Ĝis nun, testo-aro da 60-satelitoj, estis sendita al la spaco (por 60 estas spaco en la raketo Falcon 9). Finfine estos sendota 10-12 mil satelitoj. Ĝi estas nombro tre proksima al la nombro de satelitoj, kiuj estas nuntempe super niaj kapoj.

La kreado de la projekto kostos almenaŭ 10 miliardojn da dolaroj. En la unua fazo de la projekto, SpaceX portos 4.425 satelitojn al la malalta orbito ĉirkaŭ la Tero. Por ekfunkciigi la servon, sufiĉas nur 800.

Kun la satelita interreto, ni povos konektiĝi uzante specialan ricevilon - ĝi kostos ĉirkaŭ 200 USD. La sekva aro de satelitoj Starlink verŝajne flugos jam en proksimaj monatoj. La "kosma interreto" eklaboros jam venontjare.



---

*Spomenka Ŝtimec*, prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo

## Esperanto - nemateria kultura heredaĵo - en Kroatio !!!

Kroata Esperanto-Ligo ĵus ricevis leteron, fakte la decidon de ministerio pri kulturo, kiu konfirmas, ke Esperanto estis deklarita nemateria kultura heredaĵo en Respubliko Kroatio, konforme al la Leĝo pri protekto kaj gardado de kulturaj valoroj.

La kultura valoro Esperanto eniros la registron de kulturaj valoroj de Respubliko Kroatio sub la numero Z-7298.

Supozeble, la oficialan decidon oni povas konsideri la plej granda atingo en la 110-jara historio de Esperanto en Kroatio.

Post Pollando, ankaŭ en Kroatio Esperanto estas protektata nemateria kultura heredaĵo. Ni esperas, ke la kroata dokumento helpos al aliaj landoj efektiviĝi la kulturen protektadon de Esperanto. La procezo de enirigo de

Esperanto en la nacian registron de kulturaj nemateriaj heredaĵoj daŭris kvar jarojn.

Fonto: Ret-Info

---

*Peter Baláž*, prezidanto de SKEF

## Esperanto proponita kiel “Nemateria kultura heredaĵo” ankaŭ en Slovakio

La 29-an de marto 2019 SKEF (Slovakia Esperanto-Federacio) sendis oficialan proponon al la Nacia Instituto (apartenanta al la Ministerio de kulturo), por enskribi Esperanton sur la Slovakian liston de la nemateria kultura heredaĵo. La titolo de la propono estas: “Jazyk esperanto – nositel’ slovenskej a esperantskej kultúry” (La lingvo Esperanto – portanto de la slovakaj kaj Esperantaj kulturoj).


La proponon akceptis kaj subskribis, krom SKEF, ankaŭ ĉiuj lokaj Esperanto-kluboj/organizoj kaj Slovakia Esperanta Junularo. Nun oni detale esploras la proponon, eventuale faros pliajn demandojn, postulos pliajn dokumentojn ktp. Fine de la jaro 2019, oni devus informi pri la akcepto, eventuale malakcepto de la propono. La proponon jam anticipas kelkaj gravaj slovakaj politikistoj. Ni esperas, ke la propono estos pozitive taksita de la pritaksantoj kaj de la ministrino de kulturo, kiu havas finan, decidan voĉon.

Okaze de la sukceso, Slovakio iĝus la tria lando (post Pollando kaj Kroatio), kie Esperanto estus tiel agnoskita – kaj tio jam donus rekte la eblon, proponi Esperanton kiel mondan heredaĵon de Unesko! Tio jam estus vere granda atingo, nepre indas provi ĝin kaj esperi pri ĝia sukceso!

Ankaŭ en Litovio nun okazas preparoj por proponi Esperanton kiel kultureman heredaĵon en ĉi tiu lando.

\*\*\*

Ĉi tiu artikolo aperis en la maja numero de *La Ondo de Esperanto* (2019). Rete: *La Balta Ondo* <http://sezonoj.ru/2019/05/slovakio-25>



## 250+ fakaj Esperanto-vortaroj en la reto!

Pli ol 250 Esperantaj fakaj vortaroj kaj terminaroj estas troveblaj en la unika kolekto de Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko – STEB, kiun ni prizorgas jam de multaj jaroj.

La vortaroj kaj terminaroj estas libere uzebaj, legeblaj kaj elŝuteblaj en interreto!

Malavantaĝo de interreto estas ĝia nestabila karaktero, multaj materialoj en la reto ofte malaperas kaj estas forviŝataj, do retaj listoj kutime enhavas amason de mortaj ligoj. En la aktivula grupo, ĉirkaŭ la retejo "eventoj-hu", ni aktualigis la supran vortaran kolekton, kaj ni faris sekurkopion pri multaj materialoj, ekde nun deponataj en nia servilo.

Ni estas kontentaj, ke ĉiuj 300+ ligoj en la kolekto estas aktualaj kaj atingeblaj.

Adreso de la vortara kolekto:  
<http://www.eventoj.hu/steb/vortaroj/>.



## Vizitindaj lokoj

*Ewa Caban*



## Du miraklaj kvartaloj

Inter vidindaĵoj de la urbo Katowice, troviĝas du loĝkvartaloj, konstruitaj por minejaj laboristoj komence de la 20-a jarcento. Ili estas *Giszowiec* (Giŝovjec) kaj *Nikiszowiec* (Nikiŝovjec). La historio komenciĝas en la jaro 1904, kiam la mineja kompanio de **Georg Giesche** (*Bergwerk-gesellschaft Georg von Giesche's Erben*) ekis fosi la minejan ŝakton *Carmer* (ekde la jaro 1935, ĝi nomiĝas *Pułaski*). Giesche, same kiel aliaj tiamaj

fabrikposedantoj, bezonis por sia minejo laboristojn.

Kaj same, kiel aliaj tiamaj industriposedantoj, li decidis konstrui tiucele porlaboristajn loĝkvartalojn. La ideo krei loĝlokon por laboristoj ekis en la duono de la 19-a jarcento. La profitoj reciprokis – posedanto de fabriko aŭ minejo akiradis certajn laboristojn, kaj la laboristoj ricevadis sufiĉe komfortajn kaj malmultekostajn loĝejojn. Kaj la higienaj kondiĉoj en la loĝejoj estis ege bonaj, kompare kun aliaj 19-jarcentaj domoj, do tie la homoj ne malsaniĝis multe; tio ankaŭ estis profito por la fabriko. Pro la garantiata laboristaro, la produktado pligrandiĝadis kaj enterprenoj povis pli facile disvolviĝi.

Giesche decidis konstrui loĝkvartalon, por havi laboristojn por la novkonstruata ŝakto. Oni decidis krei la kvartalon en la proksima al minejo arbaro. La nomo de la kvartalo estis *Gieschenwald*, t.e. arbaro de Giesche, poste ŝanĝita al *Giszowiec*. Tre rapide okazis, ke la nombro de preparitaj en *Giszowiec* loĝejoj estas tro malgranda, do baldaŭ oni komencis preparadon al konstruo de la dua kvartalo, pli proksime al la ŝakto. Tiel, la 13-an de majo 1907, la mineja kompanio de Giesche ricevis permeson por konstrui la duan kvartalon, nomitan *Nikiszowiec*. La nomo devenas de la ŝakto *Nickisch* (de 1935 – *Poniatowski*), ĉeanta al la kvartalo.



La plej grava persono, se temas pri koncepto de la kvartaloj, estis la ĝenerala direktoro de la mineja kompanio - Anton Uthemann. Ĝuste li instigis du arkitektojn el Charlottenburg, apud Berlino, nome **Emil kaj Georg Zillmann**, veni al Katowice kaj projekti la loĝejaron.

Kaj malgraŭ tio, ke la ambaŭ kvartaloj: *Giszowiec* kaj *Nikiszowiec* estis projektitaj de la samaj arkitektoj, ili aspektas tute alie. *Giszowiec* aspektas kvazaŭ vilaĝo, oni nomis ĝin eĉ *arbara vilaĝo Giszowiec*. Ĉi-tie laboristaj loĝejoj troviĝas en malgrandaj, plej ofte dufamiliaj domoj, kun ĝardenoj kaj, por ke tiu vilaĝa karaktero estu pli sentebla,

la projektitaj stratoj ne estis rektaj, ili delikate serpentumis inter la domoj. *Nikiszowiec* havas urban karakteron. La brikaj domoj ĉeas, kreante kompaktajn domkvartalojn, disigitaj per rektangulaj stratoj. La ferman formon de *Nikiszowiec* karakterizas brikaj, kvazaŭ-pordegoj/pontoj, konstruaĵoj, kiuj rektangule ligas du flankojn de stratoj.



Ambaŭ kvartaloj estis vere modernaj, por tiama tempo, kaj forte ligitaj unu kun la alia. En ĉiu el ili estis lokigitaj vendejaro, bakejo, lernejo kaj gastejo. Komunaj por la kvartaloj estis preĝejo, apoteko, policejo kaj malsanulejo. Tre bone solvitaj estis vojaĝeblecoj inter *Nikiszowiec* kaj *Giszowiec*. La mineja komunumo Giesche konstruis etŝpuran fervojon, kiu kunigis la ŝakton *Carmer* ĉe la kvartalo *Nikiszowiec* kaj la kvartalon *Giszowiec*. Poste, la fervojo estis plilongigita ĝis Szopienice (plua kvartalo de la urbo Katowice). La vojaĝo per la fervojo estis senpaga por loĝantoj. Imagu, ke dum ĉiu labortago ĝi 28-foje veturis inter *Giszowiec* kaj *Nikiszowiec* (dimanĉe 19-foje). Ĝi ĉesis labori en la jaro 1977.

Estas interese, ke en *Nikiszowiec* oni konstruis ankaŭ specialajn konstruaĵojn, kunigitaj kun funkciado de la minejo, nome: ejon, kie ministoj kolektiĝis antaŭ irado malsupren (pole *cechownia*), banejon, travestejon kaj minejan oficejon. Tiamaniere ministro, loĝanta en *Nikiszowiec*, preskaŭ rekte el sia domo eniradis sian laborlokon. Kaj la najbareco de minejo estis ankaŭ utila por loĝantoj. Interalie la minejo liveris al domoj senpagan kurenton. La loĝantoj devis aĉeti nur ampolojn! La alia profito estis la mineja fajrobrigado, kiu gardis la domojn en *Giszowiec* kaj *Nikiszowiec*. Kaj ministoj ricevadis karbon, por varmigi siajn domojn.

Kiu estas la posta historio de la kvartaloj? *Giszowiec* estis parte ruinigita en la 70-aj jaroj de la 20-a jarcento. Ĝis nun ekzistas nur pli mapli triono de la kvartalo. Kaj *Nikiszowiec* estas preskaŭ ne ŝanĝita, nune ni povas admiri ĝian belecon kaj saĝecon de la projektantoj.

## GISZOWIEC

Antaŭ ol Zillmanoj projektis la kvartalon, la direktoro Uthemnan ordonis al ili analizi konstrumanieron de domoj en sileziaj vilaĝoj kaj laŭ ĝi prepari projekton. *Giszowiec* estis konstruita en la jaroj 1907-1910. Plano de la kvartalo formis rektangulon, granda 750 je 1000 metrojn. La kvartalo estis planita por 1000 laboristoj. En la centro estas placo, de kiu radiece forkuras stratoj. Aliaj stratoj estas radoformaj. La kvartalo enhavis 300 domojn por 600 familioj. Kiel mi jam skribis, la inspiro por la arkitekturo estis vilaĝaj domoj en Supra Silezio. La domoj estis similaj, sed ne estis egalaj. Fakte, tiuj 300 domoj estis konstruitaj en 40 tipoj. Tiamaniere projektantoj de la kvartalo evitis monotonecon. Estas interese, ke estis multaj reguloj por loĝantoj. Interalie ili koncernis formon de bariloj kaj organizadon de ĝardenoj.



Giszowiec iama oficejo



Domoj de laboristoj

La plej grava loko en la kvartalo, ĝia vera centro, estas *Placo sub tilioj*. Ĉe la rektangula placo, troviĝis la plej gravaj konstruaĵoj kaj oficejoj, kiel ek gastejo kun restoracio, arbar-administra oficejo, aro de vendejoj, lernejo kaj ne ekzistanta jam oficejo. La gastejo estas tre granda konstruaĵo, ŝajne la plej granda en la kvartalo, ĝi estis kultura centro de Giszowiec. Ene estis restoracio kun elektra lumigo, elektraj ventoliloj kaj projekciilo. La restoracio posedis ankaŭ scenejon, kiu ebligis teatraĵojn. Supre, en la unua etaĝo, troviĝis hotelaj ĉambroj kaj loĝejo de la posedanto de la gastejo. Ĉirkaŭ la gastejo estis bela parko, ankaŭ elektre lumigita kun koncertejo kaj restoracia ĝardeno. Ĉe la gastejo troviĝis ĉarejo kaj ĉevalejo, la dua konstruaĵo ekzistas ĝis nun. Nuntempe ĝi akiris la novan nomon – *gawlikówka*, de la familia nomo Ewald Gawlik, unu el pentristoj, kreintoj de tn. *Grupa Janowska* (Grupo de Janów), kolektiĝanta tre famajn neprofesiajn pentristojn, iamaj ministoj. En la domo oni organizis nun iuspecan, etan muzeon.

En la okcidenta parto de la centra placo, estas konstruaĵo kun vendejoj. La vendejoj estis en teretaĝo, sube, en keloj, estis magazenoj, supre – loĝejoj por vendistoj kaj iliaj familioj. Malantaŭ la konstruaĵo iam estis loko, kie oni produktis glacion, interalie por malsanulejo kaj restoracio. Kaj la fabriko de glacio estis kunigita per tuboj kun viand-vendejo; tiamaniere la malvarma aero venis rekte al fridĉambro.

La domoj por laboristoj estis ĉefe 2-familiaj, konstruitaj el brikoj, por ke ili estu pli rezistaj al fajro. Tegmentoj de laboristaj domoj estis kovritaj per ŝindoj, ne per tegoloj kiel hodiaŭ. Ĉiu domo havis apartan enirejon. Ĉiu posedis malgrandan kelon kaj subtegmentejon. La domojn ĉirkaŭis ĝardenoj kaj negrandaj kortoj kun porkejoj kaj kokejoj.

En la kvartalo oni konstruis ankaŭ 5 domojn por ministoj sen familioj. En ĉiu el ili troviĝis kvin 6-personaj ĉambroj. En ĉiu domo troviĝis komuna, sed moderna lavejo. Tiuj domoj jam ne ekzistas.

Por protekti konstruaĵon de domoj kontraŭ influo de humideco, en la domoj ne estis akvo-instalaĵoj. Estis eĉ malpermesite lavi kaj sekigi vestaĵojn en domoj. Oni povis fari ĉi-tion nur en komuna lavejo. La lavejo estis tre moderna, en ĝi troviĝis 32 lavlokoj, kun modernaj elektraj lavmaŝinoj. La planko estis kovrita per asfalto pro utilaj kialoj. Oni diris, ke en lavejo eblis dum tri horoj lavi, sekigi kaj kalandri malpurajn vestojn, kolektitaj dum unu semajno.

Giszowiec - akvoturo



# NIKISZOWIEC





*Nikiszowiec* plejparte estis konstruita en la jaroj 1911-1919. La ĉefa placo de *Nikiszowiec* estas la placo *Wyzwolenia* (Liberigo). Ĝi troviĝas en la centra parto de la kvartalo. La placo estas tre longa, ĝi vere aspektas kiel pli larĝa fragmento de la strato. Tie, en la mezo de *Nikiszowiec*, troviĝis gravaj konstruaĵoj, kiuj servis por la tuta loĝantaro: vendejaro, preĝejo, lavejo kun kalandrejo – nuntempe estas tie muzeo. En la nordorienta parto troviĝis gastejo (restoracio kun iuspeca kulturdomo). La muro de la gastejo estas ornamita per mozaiko, kiu prezentas rozojn. La mozaiko respegulas ornamon de la silezia virina vesto. En la suda parto de la placo troviĝis apoteko kaj policejo kun iama arestejo.

Ekster la kvartalo, ĉe la nuna strato *Zamkowa* (Kastela), troviĝas iama malsanulejo por infektuloj, konstruita en 1912, kaj gardejo por infanoj, konstruita en 1918. Ili ambaŭ estis gvidataj de monakinoj. Unu el domoj en *Giszowiec* estis destinita por kuracisto. Li zorgis pri loĝantoj de ambaŭ kvartaloj.

La domoj por laboristoj estis konstruitaj inter la jaroj 1911 kaj 1919. Ili estis brikaj, tri-etaĝaj, formantaj 9 domkvartalojn. En unu etaĝo estis kvar loĝejoj, kiuj konsistis el 2 ĉambroj kaj kuirejo. La loĝejoj de oficistoj estis pli grandaj – 3 aŭ 4-ĉambraj, kun kuirejo kaj eĉ kun banejo. Sur unu etaĝo trovigis 4 loĝejoj, por ĉiuj du estis komuna necesejo en koridoro. Loĝejoj por oficistoj estis pli grandaj kun 3 aŭ 4 ĉambroj kaj ĉiu el ili havis propran necesejon.

Meze de la interna korto troviĝis etaj porkejoj, ĉar la loĝantoj povis bredi por siaj bezonoj kokinojn, kuniklojn aŭ porkojn. Ili ankaŭ kulturis terpomojn kaj brasikon sur etaj kampetoj, troviĝantaj ekster la kvartaloj. La laboristoj ne gajnis multe da mono, kaj la ebleco bredi bestojn por viando kaj kulturi terpomojn faciligis ilian vivon. Meze de la kortoj troviĝis ankaŭ bakfornoj por baki panon.

Nikiszowiec kaj Giszowiec ĝis hodiaŭ mirigas pro la arkitektura ideo kaj ĝia realigo. Se vi estos en Katowice – nepre vizitu la lokojn, gustumu silezian fromaĝkukon en la loka bakejo, trinku bieron kaj sentu etoson de la silezia pasinteco.

## Homoj

*Andrzej Tichomirow, Belorusio*

### Zamenhof en Grodno

Preskaŭ ĉiutage mi preterpasas la domon de Ludoviko Zamenhof. Li loĝis ĉi tie apenaŭ kelkajn jarojn kaj, bedaŭrinde, li devis foriri de ĉi tie, serĉante pli bonan laboron. Homo bezonas laboron por povi vivi. Salajro de la okulisto en Grodno, fine de la 19-a jarcento, ne estis certa. Krome, Zamenhof plu okupiĝis pri sia lingvo, pri la lingvo, kiu, kreita kiel ilo por interkompreniĝo en la revata de li nova homkomunumo, pli kaj pli populariĝis en internaciaj kontaktoj.

Kiam mi pripensas: “Kial Zamenhof faris tion?”, venas en mian kapon unu penso: homoj estas tro dividitaj. Kelkfoje ili ne scipovas interkompreniĝi, ĉar dividas ilin tradicioj, religioj, propraj lingvoj kaj antaŭjuĝoj. Zamenhof verŝajne pensis, ke komuna, ne tro komplika lingvo helpas al homoj en la tuta mondo kompreni, ke ili estas homoj, malgraŭ ĉiuj disdividoj.




Post pli ol cent jaroj, post teruregaj militoj, amasaj ekstermadoj, grandaj malkovroj, la homaro plu estas dividita. Tamen, mi pensas, ke simplaj homoj pliproksimiĝis, almenaŭ dank’ al novaj teknologioj. Oni povas skribi leteron kaj post kelkaj sekundoj ĝi estas legita de la adresato. Oni povas facile telefoni al iu en la malproksima angulo de la mondo, oni povas eĉ vidi sin dum tiu interparolo. Oni povus tion fari, kondiĉe ke oni konus la komunan lingvon. En la hodiaŭa mondo multaj homoj konas po kelkaj

lingvoj. Kelkfoje ili lernas la lingvon de iu malproksima parto de la mondo, por fari karieron, kelkfoje- por kontakti kun amata persono, kelkfoje, ĉar tio interesas ilin aŭ estas ilia hobia. Ĉu tamen komuna, universala lingvo povas faciligi interkompreniĝon kaj samtempe malgrandigi kverelojn kaj konfliktojn? Ĉu tio ne estas utopio? Mi ne konas la respondon al tiu demando, tamen mi opinias, ke valoras provi uzi ĝin. La uzado de la komuna lingvo, kiu ne anstataŭas la naciajn, estas unu el metodoj, por solvi multajn problemojn.

Mia propra historio, ligita kun Esperanto, estas la tutan tempon kiel malfermita kajero. Jes - kajero, ne libro, ĉar mi lernas lingvojn skribante taskojn en kajeroj. Eble tio estas la metodo eksmoda, tamen por mi ĝi taŭgas. La lernolibron de Esperanto mi aĉetis en la jaro 1993. Mi memoras, ke mi tralaboris preskaŭ tutan gramatikon, tamen en la ekzercoj mi malvenkis. En tiu tempo mi lernis en la mezlernejo la francan kaj ĝia studado pli okupis min. Esperanto fariĝis malpli grava. Tiam mi jam sciis, ke Zamenhof vivis i.a. en Grodno, tamen mi ne suspektis, ke li havis malfacilaĵojn por vivteni sin kaj sian familion, ke malgraŭ tio li obstine okupiĝis pri Esperanto. Lia revo estis pli forta ol aliaj malfacilaĵoj.

Esperanto revenis al mi ĉi-jare. De kelkaj jaroj mi ne povis trovi konstantan laboron, mi sentis min senbezona. Multaj homoj en la mondo estas senlaboraj, tio ne estas nova problemo. Mi okupiĝis ĉefe pri tekstoj: mi tradukis ilin, redaktis kaj skribis la proprajn. De kelkaj monatoj mi havas konstantan laboron, mia vivo ŝangiĝis. Ĉirkaŭas min libroj kaj homoj. Mi rakontas al la turistoj pri la vivo de Eliza Orzeszko, la fama pola verkistino, kiu vivis en Grodno. Kaj denove mian vivon eniris Doktoro Esperanto. Li esperantigis la romanon "Marta" de tiu verkistino kaj de tiam ŝian verkon ekkonas loĝantoj de tiel malproksimaj landoj kiel Koreio kaj Japanio.

Pasis kelkaj monatoj de mia vizito en la Centro de Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko. Neniam pli frue mi estis tie kaj ĉi-somere, finfine, mi trovis tempon por rigardi la ekspoziciojn kaj interparoli kun la laborantaj tie personoj. La vizito kaŭzis, ke post la reveno hejmen, la E-lernolibro revenis sur mian skribotablon. Granda travivaĵo estis por mi la perado dum la transdono de kelkaj libroj el Bjalistoko al la biblioteko en Grodno. Inter ili estis la libroj en Esperanto kaj ankaŭ „Marta” de E. Orzeszko en la japana lingvo, eldonita en 1929. Sen Esperanto kiel pontlingvo la libro, verŝajne, ne aperus. Mi



eksciis, ke iu en Japanio aĉetis la libron, sendis ĝin al Bjalistoko kaj de tie ĝi venis al Grodno. Nun ĝi troviĝas en la domo de Eliza Orzeszko. La vojaĝo de la libro estus pli komplika antaŭ 100 jaroj, hodiaŭ fariĝis pli facila. Tamen, plej gravas, ke homoj, kiuj skribis al si pri tiu afero, kontaktiĝis en Esperanto. La komuna lingvo montriĝis ne nur la metodo transdoni pensojn, sed ankaŭ kunigis fortojn, por atingi la komunan celon.

Bedaŭrinde, mi ne konas la japanan. Konatulino el Japanio helpis al mi transliterumi la titolon de la libro. Teni en la manoj la libron „Marta” en la japana estis por mi escepta travivaĵo. Mi komprenis, ke valoras lerni Esperanton, ĉar malgraŭ malproksimeco de diversaj kulturoj kaj lingvoj, eblas interkompreniĝi kaj eĉ senti sin ero de la homkomunumo. De la komunumo, kiu ne forigas la naciajn aŭ lingvajn diferencojn, sed helpas kompreni aliajn homojn. Esperanto povas esti la ŝlosilo al la pli bona mondo.

La domo de Zamenhof en Grodno surhavas hodiaŭ nur la memortabulon. Valorus, ke ĝi estu ankaŭ la domo, en kiu eblus lerni Esperanton kaj en ĝi interparoli.

## Lingvosciencia angulo

*Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*

### „La” ĉe propraj nomoj – tria parto

#### Pruntitaj artikoloj

Iuj normalaj propraj nomoj havas en iuj naciaj lingvoj difinan artikolon, kiu estas kvazaŭ parto de la nomo. En Esperanto tiaj nomoj ne havu artikolon. Ekz. *Hago* (urbo en Nederlando) neniam havas artikolon en Esperanto, kvankam en pluraj lingvoj ĝi havas artikolon, kiu estas firma parto de la nomo (ekz. *Den Haag, La Haye, The Hague, l'Aia*). Same oni uzas *Havro* sen artikolo, kvankam en la Franca estas ĉiam *Le Havre* kun artikolo. Arabaj propraj nomoj ofte havas difinan artikolon en la Araba, sed en Esperanto ili ne havu artikolon: *Kairo, Riado, Kuvajto* k.t.p. Sed iafoje oni tamen vidas tiajn artikolojn ankaŭ en Esperanto: *la Himalajo, la Atlantiko, la Mediteraneo* (normale sen artikoloj). Tio estas neĝusta, sed iafoje tolerebla. Propraj nomoj ofte rifuzas tute plene Esperantiĝi.

Ĉe iuj ĉi tiaj nomoj origina artikolo fariĝis parto de la Esperanta radiko: *La-Pazo* (aŭ *Lapazo*), *La-Plato* (aŭ *Laplato*), *El-Salvadoro* (aŭ



*Elsalvadoro, Salvadoro*), *Los-Anĝeleso* (aŭ *Losanĝeleso*), *Alĝero*. (“La”, “el” kaj “los” estas Hispanaj artikoloj. “Al” estas Araba artikolo.)

## Nomoj de tempodividoj

Monatonomoj (*Januaro, Februaro, Marto, Muharamo*<sup>o</sup>, *Ramadano, Brumero* k.a.) estas normalaj propraj nomoj. Ili do normale ne havas *la*, tute laŭ la bazaj reguloj por tiaj nomoj (kaj estas skribataj kun komenca majusklo):

- *Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de **Februaro** de la jaro mil sepcent tridek dua. Februaro estas difinita konata afero. Se ĝi ne estus normala propra nomo, ĝi nepre havus la.*

Nomoj de festoj (*Kristnasko, Pasko, Pentekosto, Aŝuro*<sup>o</sup> k.a.) estas plej ofte traktataj kiel normalaj propraj nomoj sen *la*, kvankam iuj (ekz. *Kristnasko*) fakte estas ordinaraj O-vortoj. La uzado tamen varias:

- *Al **Kristnasko** venis letero de ŝia patro. = Al la tiujara Kristnasko...*
- *Post **Aŝuro**<sup>o</sup> li veturos al Teherano. = Post la ĉi-jara Aŝuro...*
- *Ĉi tio estas la leĝo pri **la Pasko**.*

Semajntagoj (*lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato, dimanĉo*) ne estas propraj nomoj, sed ofte ili estas uzataj propranomece sen *la*, kvankam difinitaj kaj konataj:

- *Dum la tuta semajno ŝi estis malgaja kaj ploris multe da varmegaj larmoj; sed kiam venis **la dimanĉo**, ŝi diris: “Vere, nun mi sufiĉe suferis kaj luktis!”*

- *Hodiaŭ estas **sabato**, kaj morgaŭ estos **dimanĉo**. Oni ne uzas *la*, ĉar *sabato* kaj *dimanĉo* ĉi tie nur informas pri la speco de tago. Ne temas pri propraj nomoj.*

- *Mi intencas veni Bulonjon **ĵaŭdon**. Difinita konata ĵaŭdo prezentata propranomece sen *la*.*

- *“**Dimanĉon** ni nin vidis.” [...] Venis **la dimanĉo**. Temas pri la sama dimanĉo, same konata ambaŭfoje, unuafoje propranomece sen *la*, duafoje kun *la*.*

Sezonoj (*printempo, somero, aŭtuno, vintro*) kaj tagopartoj (*mateno, tagmezo, vespero, nokto* k.s.) estas ĉiam ordinaraj O-vortoj, kaj oni uzas *la* tute laŭ la normalaj reguloj:

- *En **somero** ni veturas per diversaj veturiloj, kaj en **vintro** ni veturas per glitveturilo. = En somera tempo... en vintra tempo...*

- *En **la printempo** la glacio kaj la neĝo fluidiĝas. Ĉi tiu ekzemplo estas tute simila al la antaŭa, sed ĉi tie ja aperas *la*. Kiam oni parolas ĝenerale pri specoj, oni ofte povas uzi aŭ forlasi *la* depende de la stilo.*

- *Tiujn fabelojn ni aŭskultos en **vin**tro.* = ...en vintra tempo. ...en iu *vin*tro.

- *Fariĝis **mateno**.* = *Fariĝis matena tempo.*

- ***La nokton** ŝi pasigis ĉe sia laboro.* Temas pri certa konata nokto. Tial *la* estas uzata, tute laŭ la bazaj reguloj por ordinaraj O-vortoj.

- *Ĉirkaŭas min **nokto**.* ≈ *Ĉirkaŭas min mallumo.*

Laŭ iuj gramatikistoj tiaj vortoj estas iafoje uzataj propranomece, sed temas ĉiam pri frazoj, en kiuj oni parolas pri speco de tempo, kaj en tiaj okazoj *la* estas ĉiuokaze nebezona.

### Lingvonomoj

Lingvonomoj kun O-finaĵo (ekz. *Esperanto*) estas tute normalaj propraj nomoj. Oni do normale ne uzu *la* ĉe ili.

### Mallongigitaj propraj nomoj

Mallongigojn de propraj nomoj faritaj el ordinaraj vortoj, oni plej ofte traktas kiel normalajn proprajn nomojn (sen *la*). La uzado tamen tre varias:

- *Mi trovis tiun vorton en (la) Plena Ilustrita Vortaro.* → *Mi trovis tiun vorton en **PIV**.* Antaŭ la plena nomo oni povas uzi *la*, sed antaŭ la mallongigo tio kutime ne okazas.

- *Tiujare la Universala Kongreso denove estos ekstereŭropa.* → *Tiujare (la) **UK** denove estos ekstereŭropa.* Mallongigoj de nomoj de kongresoj iafoje estas uzataj kiel normalaj propraj nomoj (sen *la*), sed alfoje kiel ordinaraj O-vortoj (je bezono kun *la*).

- *Ĉu vi estas membro de Universala Esperanto-Asocio?* → *Ĉu vi estas membro de **UEA**.* Oni povas uzi *la* antaŭ la plena nomo *Universala Esperanto-Asocio*, ĉar la ĉefvorto estas ordinara O-vorto, sed praktike tio apenaŭ okazas ĉe tiu ĉi tre konata nomo. Antaŭ la mallongigo formo *UEA* la artikolo *la* neniam aperas.

## Literaturaĵoj

Roman Dobrzyński

### Verda Simio

Tiel nomiĝis Esperanta kabaredo, fondita en la jaro 1958. Konsistigis ĝin studentoj de Muzika Akademio kaj Teatra Altlernejo en Varsovio. Nur mi, kiel studento de juro, ne reprezentis la artan medion. Sed mi konis

Esperanton, kiu tiutempe montriĝis atrakcia novaĵo. Nia kabareda grupo entuziasme akceptis la nomon “Verda Simio” kaj volonte eklernis Esperanton. Ĝi baldaŭ fariĝis la ĉefa lingvo de niaj programoj. Kun la pola nomo “Zielona Maĵpa” ĝi konkeris ankaŭ neesperantistan publikon. Ĝiaj programoj grandparte konsistis el kantoj, kiuj povis esti plenumataj en ambaŭ lingvoj, konforme al la aktuala bezono. Nun ŝajnas fantazio, ke ni prezentiĝis antaŭ centoj da spektantoj.



La frivola nomo “Verda Simio” posedas tute seriozan historian fonon. La oktobro 1956 simbolas en Pollando la finon de la stalinisma epoko. Postsekvis ĝin, laŭ la sento de mia generacio, revoluciaj ŝanĝoj, mirinde sen sango. En la tiama etoso ankaŭ Esperanto povis reĝermi, traktata pli frue kiel “danĝera lingvo”. Multe gravis la favora por Esperanto rezouluco de UNESCO kaj ĝia posta rekomendo celebri en la tuta mondo la centan naskiĝdatrevenon de Ludoviko Zamenhof, en la jaro 1959. La tiama pola reĝimo akceptis la proponon de Universala Esperanto-Asocio okazigi la jubilean Universalan Kongreson de Eperanto en ĝia lulilo - Varsovio. Ĝi estis la unua post la milito UK en, tiel nomata, socialisma bloko kaj

kunvenigis rekordan nombron de 3250 partoprenantoj. Sekve de tio, la pola movado impone kreskis. "Pola Esperantisto", aĉetebla en kioskoj, estis eldonata foje eĉ en 4 mil ekzempleroj, "Pola Radio" ĉiutage disaŭdigis en la tutan mondon siajn programojn en la internacia lingvo.

Por gejunuloj Esperanto montriĝis reala fenestro al la vasta mondo. Pola Esperanto Junularo, kiel sekcio de Pola Esperanto Asocio, fariĝis pli vigla ol ĝia patra organizaĵo. Danke al la "Oktobro 56" el siaj katakumboj eliris esperantistoj, kiuj mirakle transvivis la grandan militon, kaj poste sukcese rezistis la mornan tempon de la stalinismo. Tiu ĉi parto de la renaskiĝinta pola esperantistaro estis sufiĉe altaĝa. La alian parton konsistigis junularo. Mankis mezaĝuloj. La intergeneracia vakuo inter maljunuloj kaj gejunuloj kaŭzis kelkajn problemojn, sed ĝin ankaŭ karakterizis amuzaj diferencoj. Por ni, gejunuloj, estis ridinda ceremonio de veteranoj, ilia serioza celebrado de siaj funkcioj kiel prezidantoj, ĝeneralaj sekretarioj kaj estraranoj, pompa manifestado de sia graveco, supertaksado de siaj agoj, konsiderataj ĉiam kiel "granda sukceso". Sed plej forte impresis nin ilia kverelemo.

Fine de la kvindekaj jaroj de la pasinta jarcento, en Pollando lavange fondiĝis kabaredoj, plej multaj, en la studenta medio. La tiama Esperantujo montriĝis bona kampo por kulturi kabaredan agadon. Mi mem, pro mia

natura humorsento, trovis ĉe veteranoj sufiĉe da kialoj por moki ilian konduton. En tiaj cirkonstancoj naskiĝis "Verda Simio". Kial simio kaj kial verda? Mi ŝuldas tiun ĉi nomon al la simpatia veterano Mieczysław Majewski. Li donacis al mi la libron "Verdkata Testamento" de Raymond Schwartz, de kiu mi eksciis pri la fama kabaredo "Verda Kato", aganta en Parizo antaŭ la dua mondmilito. Post arda diskuto, nia grupo decidis en la nomo de nia kabaredo anstataŭi katon per simio.

Roman Dobrzyński aktoras en la kabaredo "Verda Simio"



La rapide kreskanta esperantistaro kaj la leviĝanta lingva nivelo certigis ĉiam pli vastan publikon, do la ĉefa lingvo de “Verda Simio” fariĝis Esperanto. Mi tradukis kanzonojn kaj verkis tekstojn de monologoj kaj skeĉoj, kutime en la kruda formo. Poste, ili estis adaptaj por la scenejo per komuna inventado de gagoj kaj diversaj akcesoraĵoj. Homoj ridis, tio konfirmis, ke niaj tekstoj estis komprenataj kaj Esperanto estas vivanta lingvo. Oni ne nur ridis, sed ankaŭ protestis, koleris, ofendiĝis, tamen la plimulto ĝoje aprobis nian kabaredon.

Notinda epizodo en la historio de “Verda Simio” estis ĝia prezentiĝo dum la Jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio (1959), kion ni dankis al la favora apogo de la tiama konstanta kongresa sekretario, Gian Carlo Fighiera, la posta edzo de la eminenta pola esperantistino Ada Fighiera-Sikorska. La tondra rido kaj forta aplaŭdo de la internacia publiko legitimis la kvaliton de nia kabaredo. Veran triumfon ĝi gajnis, dum la Internacia Junulara Kongreso en la bulgara urbo Vraca (1963), per la programo “Komuna Fotografajo”. Al tiu ĉi spektaklo sukcese kontribuis la brito Diccon Masterman. Kun sia angla flegmo li amuze kontraŭstaris la temperamenton de la cetera pola trupo. Post la kongreso de TEJO en Vraca, “Verda Simio” prezentiĝis ankaŭ dum la UK en Sofio. Kaj, kiel “Zelenata Majmuna”, ni montris nian programon por la bulgara neesperantista publiko en Plovdiv.

Baldaŭ, la plimulto da “verdaj simioj” diplomiĝis kaj komencis sian profesion karieron. Sekvis rutinaj eventoj de la vivo, kiuj ne plu lasis tempon por la “frenzaĵoj de la juneco”. Kaj kio okazis kun la tekstoj? Grandparte ili ekzistis kiel malnetaj manuskriptoj kaj multaj aliaj simple perdiĝis. Sed parton da ili mi sukcesis trovi kaj mi decidis publikigi, por ilin savi de la forgeso. Mi elektis ĉefe monologojn, kiuj plej taŭgas por legi. Ili kutime koncernas konkretajn eventojn kaj etoson de sia tempo, do ili povas esti ne plene kompreneblaj, sed eble malgraŭ tio interesaj. Kelkaj el inter ili, mirinde, konservis sian aktualecon.

Jen unu el tekstoj de la kabaredo.

## Retoriko

Ni kolektiĝas ĉi tie, por ĝui feston, la 103-an datrevenon de la naskiĝo de nia Majstro. Tio estas granda festo! Tiun ĉi tagon okazas ankaŭ tradicia omaĝo de Esperantaj Libroj. En la pasinteco, mankis senpera kontakto inter esperantistaro, pro tio nia kara lingvo estis uzata nur skribe. Nun, Esperantujo estas la sola lando en la mondo sen analfabetoj. Esperantistoj

multe vojĝas kaj komprenas, ke ne plu necesas disipi monon por aĉetado de libroj kaj perdi tempon por ilia legado. Alvenis la fazo de Esperanto parolata. Nuntempe ĉiuj esperantistoj scipovas paroli! Paroli! *(laŭtaj aplaŭdoj)*

Tamen, ne sufiĉas paroli! Necesas paroli tiel, kiel indas esti parolata nia belsona lingvo: korekte, bele, elokvente. Laŭ la strategia laborplano, ĵus akceptita de nia estraro, baldaŭ ni ĉiuj estos oratoroj. Tio fariĝos danke al organizado de oratoraj konkursoj, ĉiuloke kaj ĉiumomente. Mi certas, ke nia plano estos efika. Kial? Rigardu! Jen RETORIKO. Tiu ĉi grandioza libro perfekte koincidas kun nia hodiaŭa Festo de Libro. Per „Retoriko” al efiko!!! *(aplaŭdegoj)*.

La Majstro mem donis ekzemplojn, kia Esperanto devas esti parolata. Nur tia, kiu baziĝas sur la reguloj, kiujn enhavas tiu ĉi libro “Retoriko”. Sekvante ĝian indikon, oratoros ĉiu esperantisto, sendepende, ĉu li nomiĝas Eriko aŭ Frederiko, ĉu li estas amiko aŭ malamiko, laiko aŭ katoliko... *(Spontanaj voĉoj:... kleriko, kanoniko, fanatiko, skeptiko, ciniko, stoiko...)*

Aŭ kiu ajn iko! Ekzemple: matematiko... *(Spontanaj voĉoj: aritmetiko, multipliko, statistiko, optiko, fiziko...)* Kaj ne forgesu pri metafiziko. Jes, en neniu branĉo de scienco kaj tekniko okazas evoludinamiko sen apliko de retoriko. Ĉu sen retoriko estus imagebla progreso en ekonomiko aŭ...? *(Spontanaj voĉoj: hidraŭliko, hidrostatiko, atletiko, olimpiko)*

Jes, jes, olimpiko! Kiel magra estus olimpiko sen retoriko de nia Prezidanto, sen liaj polemikoj pri olimpiko!?!... Apliko de retoriko estu senlima en praktiko. Ekzemple, en politiko, en prediko, en logiko, en kritiko, en repliko... *(Spontanaj voĉoj: pikniko, paniko, kliniko, fabriko, striko, ekskomuniko, etiko, didaktiko, muziko)*

Kaj eĉ mimiko estas ja senvorta retoriko! Dankon, kara publiko, pro via kompreno, ke sen retoriko maleblas efiko en praktiko. Se mankas retoriko, ne helpas artifiko, nek amplifiko. Sen ĝi valoras neniuj kvalifiko, klasifiko...*(Voĉoj: grafiko, mistifiko, gratifiko, trafiko,...)*

Kaj ĉiu alia fiko, samideanoj! Eĉ tiel granda kiel Pacifiko. Ho, nemezureble vasta Pacifiko! Tuj rememore venas Magelano. Indiĝenoj formanĝis lin en Pacifiko, ĉar ili ne povis frate interkomporeniĝi kun li en praktiko. Jen la vera viktimo de la muroj de miljaroj! Ni faligu ilin en Pacifiko, irante kuraĝe laŭ la spuroj de samideano Magelano, sed ĉifoje armitaj per “Retoriko” en la mano! *(Spontanaj voĉoj: Vivu samideano Magelano! Vivu retoriko en Pacifiko!)*

Sed, ne mankas samideanoj trans aliaj oceanoj. Trans Atlantiko estas Ameriko, kie ankaŭ bezonatas erotiko...Pardonu! Retoriko. Per psiko ni ligu

nin kun samideanoj en Meksiko kaj Kostariko. Tiuj ĉi foraj landoj en Centra Ameriko estas virga kampo por nia retoriko. En nia strategia plano troviĝas tasko, kies efiko estos nasko de la unua samideano en Kostariko. Li estos Adamo, la frukto de internacia amo. (*Spontanaj voĉoj: Vivu internacia amo! Vivu internacia amo!*)

En Nord-Ameriko vivas milionoj da Esperanto-analfabetoj, kruele devigataj paroli la anglan lingvon. Ili estas grandparte sklavoj, importitaj el Afriko. Nuntempe ne plu eblos tiu ĉi fia praktiko, ĉar ĵus ekveturis esperantista Karavano de Amikeco al Afriko. La nomo mem de la karavano estas indiko, ke ĝia celo estas amikoj, samideanoj Afrikanoj!! (*Spontanaj voĉoj: Vivu samideanoj afrikanoj! Vivu amikoj en Afriko!*)

Baldaŭ, amikoj en Afriko lasos en muzeoj siajn tam-tamojn. Ĉiuj afrikanoj fariĝos niaj samideanoj. Karavano de Amikeco portas al Afriko milojn da ekzempleroj de "Retoriko". Danke al la propedeŭdiko de "Reteriko", niaj samideanoj afrikanoj fariĝos oratoroj en praktiko. Permesu al mi solene tosti: Per retoriko al efiko en praktiko! (*Longa skandado: Per retoriko ktp.*)

Sed kio estu tiu ĉi praktiko? Nia strategia laborplano lanĉas la mondan kampanjon pri centoj, miloj da oratoraj konkursoj. Rezulte, ĉiu samideano konkursano estos premiita per la Lapenna-Pokalo. Ne gravas, ĉu li estos Dedalo aŭ Hanibalo, bengalo aŭ portugalo, kaporalo aŭ generalo... (*spontanaj voĉoj: marŝalo, admiralo, kardinalo, kanibalo, neardentalo.*)

Ni superŝutos la tutan teron per pokaloj, en ĝangaloj kaj valoj, en haloj kaj katedraloj, en ĉiuj kontinentoj, inkluzive de Afriko, Ameriko kaj Antarktiko! Kaj ĉio ĉi estos en praktiko la signalo de nia venko-finalo!!! (*Spontanaj voĉoj: Vivu Venko-Finalo! Vivu Fina Venko! Vivu Venko-Finalo, Vivu Fina Venko!*)

\*\*\*

La startegia laborplano ne plenumiĝis en la realo, pro la batalo inter la Fina Venko kaj la Venko-Finalo.

1963



*Konrad Andrzejuk*

### Moderna Babelturo – (mult)lingva problemo hodiaŭ

En la mondo ekzistas ĉirkaŭ 6000 lingvoj. Laŭ UNESKO, 2540 el ili, kio egalas al pli ol 42%, estas endanĝerigitaj. Lingvoj mortas ĉiujare, kune kun ĝiaj lastaj parolantoj. Ĉis nun homaro ne prilaboris ĝustan lingvopolitikon kaj la lingva problemo ŝajnas esti nesolvebla, almenaŭ en la proksima estonteco.

Malgrandaj lingvoj malaperas, kelkaj plej fortaj kreskas, sed ĉiam mankas vera lingvo universala. Se ni analizas historion de la lastaj jarcentoj, la konkludoj estas ege malfavoraj al Esperanto. Lingvoj, kiuj estis vaste uzataj en internaciaj kontaktoj, ĉiam apartenis al nacio, kies lando estis momente ekonomie forta. Iuspeca escepto de tiu regulo estis la latina – lingvo de la okcidenta kristanismo, malantaŭ kiu staris tamen grandaj politikaj fortoj kaj la grava potenco – unika, en tiuj tempoj, rolo de skriba lingvo.

Oni ne devas esti lingvisto por scii, ke lingvoj evoluas. En la rezulto de tiu evoluo, ene de la sama lingvo-familio, aperas novaj lingvoj. Tamen, ne ĉiuj lingvistoj konsentas kun tiu konstato. La kartvela sciencisto Nikolao Marr (1865-1934) opiniis, ke ĉiuj lingvoj devenas de unu pralingvo kaj ke la lingvoj, post longa evolado, unuiĝos. La teorio de Marr havis neniun sciencon valoron, ĉar ne ekzistas esploroj, kies rezultoj povus ĝin konfirmi. Tamen eblas, ke en la estonteco restos nur unu aŭ kelkaj, nemultaj lingvoj, dum ĉiuj aliaj mortos. Bedaŭrinde, tio probable ne estos rezulto de evoluo, sed de eliminado de malfortaj lingvoj. En la tempoj de la tutmondiĝo, kies rezultoj videblas en kulturo kaj vivstilo, forlaso de lingvoj de niaj praŭloj povas iĝi fakto pli rapide ol ni supozas.

Endanĝeritaj, laŭ UNESKO, lingvoj estas parolataj de 136 milionoj homoj, kio egalas al preskaŭ 2% de la monda homaro. Inter tiuj lingvoj troviĝas, la belorusa, la jida kaj la kaŝuba. La lasta estas serioze endanĝerigita, kio signifas, ke ĝin aktive uzas nur generacioj de avoj kaj praavoj. Preskaŭ 20 mil infanoj lernas la kaŝuban, dank' al ŝtataj subvencioj. El la ŝtata buĝeto estas ankaŭ financataj diversaj kulturaj projektoj, kies celo estas savo de la kaŝuba. Malgraŭ tio, en junaj generacioj apenaŭ troveblas denaskaj parolantoj de tiu ĉi lingvo. Se ĝi do ne estas parolata denaske kaj ĉiuj parolantoj de la kaŝuba havas alian komunan lingvon – la polan, oni



povas supozi, ke sen subteno de la ŝtato kaj de diversaj organizaĵoj, la kaŝuba povus morti dum, maksimume, kelkdek jaroj.

Eblas, ke la sorto de la kaŝuba rilatos baldaŭ ankaŭ al la belorusa. Malgraŭ multaj agadoj, apogantaj disvastigon kaj uzadon de la belorusa, ĝi estas uzata en ĉiutaga komunikado nur de 10% de loĝantaro de Belorusio. Tiun statistikon ne plibonigas la fakto, ke parto de televidaj kaj radiaj kanaloj elsendas en la belorusa kaj ke tiun lingvon oni povas aŭdi dum publikaj paroladoj aŭ vidi sur la ŝtataj dokumentoj. La granda ŝanco por la belorusa estas la fakto, ke ĝi iĝas populara inter junaj, bone edukitaj homoj, kiuj lernas ĝin. La belorusa estas iusence simbolo de la loka opozicio kaj estas ankaŭ volonte uzata, eĉ en reklamoj de grandaj koncernoj. Tamen, sur stratoj de la belorusaj urboj, oni ĝin aŭdas tre malofte.

Por ambaŭ, la kaŝuba kaj la belorusa, la plej grandaj malamikoj estas aliaj lingvoj – la pola kaj la rusa. Nuntempe, eĉ ĉiutaga komunikado ne estas limigita al interparolo kun homoj de proksima vilaĝo. Gravus ke eble plej multaj homoj komprenu nin kaj ke ni havu aliron al eble la plej vasta fontaro de scio, kontaktoj, distro ktp. Ĝuste pro tio, precipe malgrandaj nacioj, bone komprenas la ideon de helplingvoj.

Malgraŭ ŝajna internacia aprobo de la angla kiel universala lingvo, multaj internaciaj organizaĵoj plu uzas aliajn lingvojn. Bona ekzemplo estas Internacia Poŝta Unio, kies oficiala lingvo estas la franca. La anglan oni aldonis kiel laborlingvo nur en 1994. Malgraŭ tio, poŝtaj formularoj en multaj landoj estas plu atingeblaj nur en la loka lingvo kaj en la franca.

La plej nombre uzata lingvo en la mondo estas la ĉina. Ĝi estas denaske parolata de ĉirkaŭ kvaroble pli da homoj ol la angla. Iu povas diri, ke simple ĉinoj multnombros kaj ke tio ne gravas por eŭropanoj. Oni tamen observas interesan tendencon: ju pli rapide kreskas la ĉina ekonomio, des pli multaj homoj en la tuta mondo lernas la ĉinan. Tio ŝajnas konfirmi la tezon, ke rolo de la lingvo de internacia komunikado estas dependa de ekonomio.

Pasis pli ol 130 jaroj, de kiam L.L. Zamenhof kreis la Lingvon Internacian, esperante ke la homaro, ricevinte solvon de la lingva problemo, sukcesos apliki ĝin en la praktiko. Bedaŭrinde, la lingva problemo plu pligrandiĝas. En la tempo de la rapida tutmondiĝo, la ĝusta, lingva politiko estas unu el la plej grandaj defioj de la mondo. La venontaj jardekoj montros, ĉu ni sukcesos solvi problemon de la moderna Babelturo. La tasko estas malfacila kaj la sukceso dubinda.



## Poŝtkesto



*BES*, Literatura konkurso en Bjalistoko

Podlańia Libraro Łukasz Górnicki en Bjalistoko kaj Bjalistoka Esperanto-Societo anoncas la 9-an literaturan konkurson „Esperanto ligas homojn” por rakonto titolita „Mi estas civitano de la mondo”. La regularon vi trovos ĉe: [www.espero.bialystok.pl](http://www.espero.bialystok.pl). Dividu kun ni viajn opiniojn pri la mondo.



*Ilona Koutny*, Kunlaboro kun ĉina universitato

La 28-an de julio en Poznań, la rektoro de Zaozhuang Universitato, prof. CAO Shengqiang kaj la vicrektoro de UAM, prof. Ryszard Naskręcki subskribis kontrakton pri kunlaboro inter la du universitatoj surkampe de instruado de esperantologio. Estas planate, ke iuj studentoj el Zaozhuang Universitato, post akiro de bakalaura grado pri Esperanto, venos magistriĝi ĉe UAM. La ĉina delegacio antaŭe kunsidis kun la prof. Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj de UAM, por preparoli la eblecojn.

## Kalendaro

### Popularaj Esperanto-aranĝoj en Pollando kaj en najbaraj landoj en 2019

11.05. 2019	Esperanto-ŝtando dum 23-a Scienca Pikniko en Varsovio ĉe Nacia Stadiono „PGE Narodowy”	Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio <a href="mailto:alwamo@wp.pl">alwamo@wp.pl</a>
23-30. 05.2019	4-a Internacia Majrendevuo Wrocław - Złotyja	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / <a href="mailto:informado.eo@gmail.com">informado.eo@gmail.com</a> / Małgosia Komarnicka
23.05. 2019	5-a Internacia Simpozio, Wrocław Temo: Esperanto - disvolvado de homaj personecoj en la etapo de la junaĝo kaj la tria aĝo	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / <a href="mailto:informado.eo@gmail.com">informado.eo@gmail.com</a> / Małgosia Komarnicka
25-26. 05.2019	7-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, Wrocław en prestiĝa loko: Filharmonia str. Piłsudskiego 19	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / <a href="mailto:informado.eo@gmail.com">informado.eo@gmail.com</a> / Małgosia Komarnicka

17.06. 2019	Internacia Konkurso de Kantoj kaj Kanzonoj en Esperanto en Duszniki Zdrój	Fondaĵo de Junulara Agado Sierosławice ul. Długa 38, 26-200 Końskie, Wiesław Mietliński
31.05- 02.06. 2019	38-a Pola Esperanto-Kongreso en Łochów	Estraro de Pola Esperanto-Asocio estraro@esperanto.pl
1-2.06. 2019	Kunveno de Pola Esperanto-Junularo en Varsovio	Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl
7-18. 06.2019	41-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno	Filio de Pola Esperanto-Asocio en Gliwice stanislaw.mandrak@gmail.com
15.6. 2019	Vizito en <i>Sztolnia Dziedziczna</i> - karbogalerio en muzea karbominejo Guido en Zabrze	PEA-filio en Gliwice, Aleksander Zdechlik, aleksander.zdechlik@gmail.com
16.06. 2019	Montara Renkonto Czantoria Wielka en Beskidy Montaro	suchanekj@seznam.cz
26.07.- 04.08. 2019	Esperanta stando dum PolAndRock Festival en Kostrzyn ĉe la rivero Odra.	Renkontiĝo por memzorgantoj ene de la granda rokmuzikfestivalo Andi Münchow, rete: andim@gmx.li
27.07.- 05.08. 2019	Internacia Junulara kultura Interŝanĝo Pollando – Litovio. 15-a datreveno de membriĝo de ambaŭ landoj en EU	Centro de Interkultura Edukado en Nowy Sącz halinakomar@gmail.com
25.08. 2019	Montara Esperanta ekskurso de monto Szyndzielnia ĝis urbo Szczyrk apud Bielsko-Biała	Filio de Pola Esperanto-Asocio en Bielsko-Biała. Krystyna Zgud karad099@gmail.com
30.08- 07.09. 2019	52-a Internacia Esperantista Feriado en Łądek Zdrój	Silezia Esperanto Asocio Teresa Pomorska, pomer@wp.pl
13-15. 09.2019	Esperanto Sur la Strando - 2019 Gdynia – Sopot, temo: "Najbaroj"	Triurba Esperantista Asocio TORENTO torentosopot@wp.pl <a href="https://sites.google.com/site/esperantowsopot">https://sites.google.com/site/esperantowsopot</a> ie/ FB – Esperanto Sopot.pl

14.09. 2019	Festo de kvartalo Muranów PEA-stando dum sobĉiela festo Skvaro ĉe str. Andersa 13	Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio alwamo@wp.pl
20-22. 09. 2019	35-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto „Arkones 2019” en Poznań	E-Senco Kultur-Socia Societo je la nomo Ludoviko Zamenhof en Poznań. <a href="http://www.arkones.org/eo/">http://www.arkones.org/eo/</a>
29.09. 2019	„Tago de kreo-povo” PEA-stando en Ogród Saski en Varsovio 11:00-16:00	Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio alwamo@wp.pl
11-13. 10.2019	43-aj Esperantistaj Preĝtagoj en Częstochowa	Pola sekcio de IKUE pomer@wp.pl
9-11. 11.2019	Esperantista renkontiĝo GRUPE - 23 en Gliwice	PEA, filio en Gliwice, stanislaw.mandrak@gmail.com aŭ: staman@ka.onet.pl
6-7. 12.2019	4-a Esperanta konkurso “Vortbeleco en Esperanto” en Wrocław	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Malgosia Komarnicka
13-15.12. 2019	20-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko	Bjalistoka Esperanta Societo kontakt@espero.bialystok.pl
27.12- 3.01 2020	11-a JES Junulara Esperanta Semajno en Karlów.	Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl
1 - 8 08. 2020.	La 105-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) okazos en Montrealo (Kanado).	Universala Esperanto-Asocio uea.org
17-24.07 2021	La 106-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) okazos en Belfasto (Nord-Irlando).	Universala Esperanto-Asocio uea.org


## Popularaj Esperanto-aranĝoj en najbaraj landoj

1-9.05. 2019	Esperanto-renkontiĝo Mirinda Lviv - en Lvov, Ukrainio	Volodimir Hordijenko, p/k 35, Kiev-133, UA-01133, Ukrainio. -: tel. +38 (097) 4403172, retadreso volodomir@ukr.net. <a href="http://aromajalto.ukrainio.org.ua/">http://aromajalto.ukrainio.org.ua/</a>
-----------------	--	--

9 – 12. 05.2019	TEK - Tutslovakia Esperanto-Kongreso - en Liptovský Hrádok, Slovakio	Esperantská Federácia, Februárová 2, SK-958 01 Partizánske, Slovakio. - skef@esperanto.sk
10-16. 05.2019	Esperanto-Tendaro en Kievo, ETK - Somera tendumado apud ĉefa ukrainia rivero - Dnipro	Ihor Glagolevsjkij, str. Velika Aranautska 24/6, Odessa, Ukrainio. - tourmaestro79@gmail.com
7-10.06. 2019	96-a Germana Esperanto-Kongreso - en Neumünster, Germanio	Deutscher Esperanto-Bund e.V., s-ino Sibille Bauer, Katzbachstr. 25, DE-10965 Berlin. - retadreso: sibille.bauer@esperanto.de
6-14.07. 2019	55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj - en Panevežys, Litovio	Litova Esperanto-Asocio, p.k. 167, LT-44002 Kaunas, Litovio. - retadreso: litova.ea@mail.lt
28.07- 04.08. 2019	75-a Internacia Junulara Kongreso, IJK en Liptovský Hrádok, Slovakio.	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, TEJO. - Retadreso: ijk2019@tejo.org
17-20.10. 2019	Kongreso de Ĉeĥa Esperanto -Asocio en Brno, Ĉeĥio.	Estraro de ĈEA, náměstí Míru 1, 568 02 Svitavy, Ĉeĥio. - retadreso: cea@esperanto.cz

## Oni eldonis

Roman Dobrzyński  
**„AVO KIU ESTAS NEPO”**  
 Biografia skizo pri Ludoviko  
 Kristoforo Zaleski-Zamenhof  
 Eldonis  
 Pola Esperanto-Asocio – Varsovio  
 2019  
 Projekto de kovrilo:  
 Robert Kamiński  
 ISBN 978-83-908340-6-1  
 Grandeco A5, 15x21 cm



*Andrzej Sochacki*

### 72-a Universala Kongreso de Esperanto 1987 j.

Mi partoprenis en la impona la 72-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Varsovio en jubilea jaro 1987 (cent jaroj post eldono de la "Unu libro"), en kiu partoprenis 5946 esperantistoj el 73 landoj. Jen jen kelkaj historiaj fotoj pri la evento kaj prezento de la kongresa programo.

Alta protektanto S-ro Roman Malinowski - prezidanto de la Pola Parlamento.

Stanisław Świstak – Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato

Roman Dobrzyński – Prezidanto de la Pola Esperanto-Asocio

La 72-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en la Jubilea Jaro 1987 (100 jarojn post la eldono de la Unua Libro), de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1987 en Varsovio, Pollando. La kongreso estis rekorda, kun 5946 partoprenintoj el 73 landoj. Kongresejo estis en la prestiĝa kaj giganta *Pałac Kultury i Nauki* (Kultur- kaj Scienpalaco) en la urbocentro de Varsovio. La kongresa temo estis "Cent jaroj de internacia kulturo". Okazis 200 programeroj kun 680 artistoj, 23 prelegantoj de la Kongresa Universitato, modela Esperantologia Konferenco, pli ol 40 fakaj kunvenoj, teatraĵoj, filmoj, koncertoj, ekspozicioj. Dum tiu tempo gazetoj skribis – la plej impona UK.

**Koncertis:** Joëlle Rabu, Jerzy Handzlik kaj Jak le Puil, pola tenoro, rusa belkantistino, argentina pianistino, korea kortdancistino, familia kantgrupo el Lodzo, Persone, Amplifiki, Koruso Muzilo, Pola popola studenta ensemblo de Varsovia Politekniko, Pola popola folklorgrupo el la regiono de Lublin.

#### **Prezentitaj teatraĵoj:**

Bulgara Esperanto-Teatro, *La kaverno de Salamanka*, de Miguel de Cervantes, *Pikniko sur batalkampoj*, de Fernando Arrabal, *Nia kara lingvo Esperanto*, bazita sur Esperanta literaturo, *La Krizalido*, *Ĉu dio bojas ? (aŭ Aminda kretenino)*, de François Boyer, *La plezuro disiĝi*, de Jules Renard, Teatr Powszechny (Teatro Universala) el Łódź, *Feliĉa evento*, de Sławomir Mrożek, Gdanska Esperanto-Teatro (Wanda Neumann, Wiesław Nowicki),

*Vizaĝoj kaj maskoj*, Janusz Korczak, Vida Jerman, *Virino kiu flustris en uragano*, de Spomenka Štimec, Jadwiga Gibczyńska *Zamenhof*, Jerzy Fornal, el Nacia Teatro de Varsovio *Sopiro... Laboro... Espero...*, poezio kaj paroladoj de L. L. Zamenhof, Mirosław Henke, aktoro de la Studia Teatro "83" el Łódź *La travivaĵoj de la brava soldato Ŝvejka*, de Jaroslav Hašek, Urszula Tupajka, amatora aktorino el Bydgoszcz *Omaĝe al nia majstro*, laŭ L. L. Zamenhof kaj Antoni Grabowski, *Julio Baghy - homo bona*, laŭ Julio Baghy, Kálmán Kalocsay, Teatro Verda Monto (KVM), el Zielona Góra (ĉefrolis Mira Rządźka) *Lulkanto*, de Samuel Beckett, *Cikonioj*, de Adam Sikorski, *Serenado*, de Sławomir Mrożek (kunlabore kun Teatro Krizalido, sola atingo de projekto de granda internacia trupo por la jubileado de Esperanto).

### **Pupteatroj:**

Pupteatro Rabcio (Maciej Z. Tondera) - *Kion mi diros - tion mi diros*, de Maciej Z. Tondera laŭ Kazimierz Przerwa-Tetmajer; *La ruĝa ĉapeto*, de Anna Januszewska, Ŝtata Pupteatro Vraca, *La ovo*, de Boris Aprilov.

Robert Bánky - *Pupmiksaĵo*, de Robert Bánky

Infana pupteatro "Rideto" el Radom - *Cindrulino*, de Jan Brzechwa.

Prelegis:

William Auld, Vilmos Benczik, Marjorie Boulton, Marian Dobrzyński, Hans Eichorn, Rudi Hauger, Sinitro Kawamura, Leszek Kordylewski, Ulrich Lins, Amri Wandel, John Wells, kaj aliaj.

Tuttagaj ekskursoj okazis al: Treblinka, Łódź, Nieborów, Kazimierz Dolny, Płock, Tykocin kaj Bjalistoko.



72 -a UK en Varsovio 1987, FOTO: A. Sochacki

Pola popola studenta ensemblo de Varsovia Politekniko



Kongresejo en la Palaco de Scienco kaj Kulturo en Varsovio



Solena malfermo de la 72-a UK. De maldekstre R. Dobrzyński R. Malinowski kaj H. Tonkin





Kongresa balo Laŭreatoj de deklamkonkurso kun Urszula Tupajka (meze) el Bygdoszcz.



Antaŭ kongresejo



Kantas "Muzilo"



IJK Krakovo 1987, Foto: A. SOCHACKI

Pantonima spektaklo „Apokalipso”, okazis kiel granda, furora sukceso



72 -a UK en Varsovio 1987, FOTO: A. Sochacki




72 -a UK en Varsovio 1987, FOTO: A. Sochacki

Ĉe la Kongresejo kun Jorgos (kun barbo), kiu venis bicikle Andrzej S. kaj hispanaj E-istoj



## NIA FOTOGALERIO



Esperantista vizito en Sztolnia Dziedziczna en Zabrze kaj renkontiĝo sur monto Czantoria 15-16.6.2019



23-a Scienca Pikniko ĉe Stadion Narodowy en Varsovio 11.05.2019



Printempa kunveno de Esperantistoj en Poznań